
# LA
## *HISTORIO DE*
# *DOKTORO DOLITTLE*

KIU ESTAS LA
HISTORIO DE LIA KURIOZA VIVO
HEJME KAJ LIAJ MIRIGAJ AVENTUROJ
EN FREMDAJ LANDOJ....NENIAM ANTAŬE PRESITA


**RAKONTITA DE HUGH LOFTING**
**ILUSTRITA DE LA AŬTORO**





**LA ADIAŬA FESTENO**

"Kiam ĉiuj jam finmanĝis la Doktoro stariĝis"




La origina titolpaĝo de ĉi tiu libro

# *LA HISTORIO DE DOKTORO DOLITTLE*

DE

HUGH LOFTING

*Ilustrita de la aŭtoro*

Tradukita de Donald Broadribb

2005

Originala anglalingva eldono 1922
Unua esperantolingva eldono 2005

© la traduko: Donald Broadribb, 2005

e-libro preparita de Donald Broadribb, 2005

Al

ĈIUJ INFANOJ


ĈU INFANOJ LAŬAĜE AŬ INFANOJ LAŬKORE

MI DEDIĈAS ĈI TIUN RAKONTON

# ENHAVO


| | | |
|---|---|---|
| 1 | PUDDLEBY | 1 |
| 2 | BESTO-LINGVO | 5 |
| 3 | PLI DA MON-PROBLEMOJ | 17 |
| 4 | MESAĜO EL AFRIKO | 25 |
| 5 | LA GRANDA VOJAĜO | 33 |
| 6 | POLINEZIO KAJ LA REĜO | 41 |
| 7 | LA PONTO EL SIMIOJ | 48 |
| 8 | LA ESTRO DE LA LEONOJ | 57 |
| 9 | LA KONSILIO DE LA SIMIOJ | 64 |
| 10 | LA PLEEGE PLEJ RARA BESTO | 69 |
| 11 | LA NIGRA PRINCO | 77 |
| 12 | MEDICINO KAJ MAGIO | 84 |
| 13 | RUĜAJ VELOJ KAJ BLUAJ FLUGILOJ | 95 |
| 14 | AVERTO DE LA RATOJ | 101 |
| 15 | LA DRAKO DE BARBARIO | 106 |
| 16 | TU-TUO LA AŬSKULTANTO | 114 |
| 17 | LA OCEANO-KLAĈANTOJ | 120 |
| 18 | ODOROJ | 126 |
| 19 | LA ROKO | 136 |
| 20 | LA VILAĜO DE LA FIŜISTO | 143 |
| 21 | DENOVE HEJME | 150 |
| | KELKAJ NOTETOJ | 157 |

Sur paĝo 157 aperas kelkaj notetoj aldonitaj de la tradukinto, kiujn kelkaj legantoj eble deziros legi. En la teksto de la rakonto, tiuj kvin notetoj estas signitaj per asterisko (*).



Malgranda vilaĝo nomita Puddleby-sur-la-Marĉo

# La Historio de Doktoro Dolittle

## 1 PUDDLEBY





NI rakontas ke foje, antaŭ tre multaj jaroj — kiam niaj avoj estis malgrandaj infanoj — estis doktoro; kaj lia nomo estis Dolittle — Johano Dolittle*, M.D. “M.D. signifas ke li estis trejnita kuracisto kaj sciis vere multon.

Li loĝis en vilaĝo nomita Puddleby*-sur-la-Marĉo. Ĉiuj loĝantoj, ĉu junaj, ĉu nejunaj, bone konis lin laŭvide. Kaj kiam ajn li promenis laŭ la strato kun sia alta ĉapelo sur la kapo ĉiu diris, “Jen la Doktoro! — li estas tre lerta persono.” Kaj la hundoj kaj la infanoj ĉiuj alkuris kaj sekvis lin; kaj eĉ la korvoj loĝantaj en la turo de la preĝejo grakis kaj skuetis la kapon.

La domo en kiu li loĝis, ĉe la rando de la vilaĝo, estis tre malgranda; sed lia ĝardeno estis tre granda kaj havis larĝan gazonon kaj ŝtonajn

benkojn kaj plorsalikojn kiuj klinis siajn branĉojn. Lia fratino, Sarao, mastrumadis la domon por li; sed la Doktoro mem prizorgadis la ĝardenon.

Li tre amis bestojn kaj havis tre multajn dorlotbestojn. Krom la orfiŝoj en la lageto ĉe la malsupro de la ĝardeno, li havis kuniklojn en la manĝoŝranko, blankajn musojn en sia piano, sciuron en la tolaĵoŝranko kaj erinacojn en la kelo. Li ankaŭ havis bovinon kun bovido, kaj maljunan laman ĉevalon — dudek kvin jaraĝan — kaj gekokojn kaj kolombojn, kaj du ŝafidojn, kaj multajn aliajn bestojn. Sed liaj plej amataj dorlotbestoj estis Dab-Dabo la anaso, Jipo la hundo, Gub-Gubo la beba porkido, Polinezio la papago, kaj la strigo Tu-Tuo.Lia fratino grumbladis pro ĉiuj ĉi bestoj, kaj diris ke ili malnetigas la domon. Kaj unu tagon kiam maljuna virino afliktata de reŭmatismo venis konsulti la Doktoron, ŝi eksidis sur la erinacon kiu estis dormanta sur la sofo kaj neniam revenis konsulti lin, sed veturis ĉiun sabaton la tutan distancon al Oxenthorpe alia vilaĝo 16 kilometrojn for, por konsulti alian kuraciston.



Kaj ŝi neniam revenis por viziti lin

Tiam lia fratino, Sarao Dolittle, venis al li kaj diris:

"Johano, kiel vi povas supozi ke pacientoj venos konsulti vin kiam vi havas ĉiujn ĉi bestojn en la domo? Kia doktoro havus sian salonon plena de erinacoj kaj musoj! Nun jam kvara persono estis forpelita. S-ro Ĝenkinso kaj la Pastro diras ke ili rifuzos eĉ esti proksime al via domo denove — negrave kiom malsanaj ili estos. Ni fariĝas ĉiutage pli malriĉaj. Se vi daŭrigos tiel, neniu el la plej bonaj homoj akceptos vin kiel sian kuraciston."

"Sed mi pli amas la bestojn ol la 'plej bonajn homojn,'" diris la Doktoro.

"Vi estas ridinda," diris lia fratino, kaj ŝi formarŝis el la ĉambro.

Tial, dum la forpaso de la tempo, la Doktoro akiris pli kaj pli da bestoj; kaj la personoj venantaj konsulti lin iĝis pli kaj pli malmultaj. Ĝis fine li havis neniun pacienton — escepte de la Por-kata Viandovendisto, kiun ĝenis nenia besto. Sed la Por-kata Viandovendisto malsaniĝis nur unufoje dum ĉiu jaro — je Kristnasko — kiam li pagis al la Doktoro ses pencojn por botelo da medikamento.

Ses pencoj ĉiujare ne sufiĉis por la vivado — eĉ ne dum tiuj tagoj longe antaŭ nun; kaj se la Doktoro ne estus ŝparinta iom da mono en sia ŝparkesteto, neniu scias kio estus okazinta.


Sed li plu akiradis konstante pli da dorlotbestoj; kaj kompreneble manĝigi ilin kostis tre multe da mono. Kaj la ŝparita mono fariĝis ĉiam malpli multa.

Do li vendis sian pianon, kaj lasis la musojn loĝi en tirkesto. Sed la mono akirita per tiu vendo komencis malmultiĝi, do li vendis la brunan vestokompleton kiu li surportis dum dimanĉoj kaj plu fariĝadis pli kaj pli malriĉa.

Kaj nun, kiam li promesis laŭ la strato kun sia alta ĉapelo sur la kapo, oni diris inter si, “Jen Johano Dolittle, M.D.! Iam li estis la plej konata kuracisto en la okcidenta parto de la lando — vidu lin nun — li havas neniom da mono kaj liaj ŝtrumpoj estas truplenaj!”

Sed la hundoj kaj la katoj kaj la infanoj ankoraŭ kuris al li kaj sekvis lin tra la vilaĝo — tute same kiel kiam li estis riĉa.

## 2. BESTO-LINGVO



TAM okazis ke la Doktoro sidis en sia kuirejo parolante kun la Por-kata Viandovendisto kiu venis konsulti lin pro somakdoloro.

"Kial ne ĉesu esti kuracisto por homoj, kaj estu kuracisto por bestoj?" demandis la Por-kata Viandovendisto.

La papago, Polinezio, estis sidanta en la fenestro rigardante la pluvon kaj kantante velistan kanton al si mem. Ŝi ĉesis kanti kaj komencis aŭskulti.

"Komprenu, Doktoro, pludiris la Por-kata Viandovendisto, "vi scias ĉion pri bestoj — multe pli ol la veterinaroj. Tiu libro kiun vi verkis — pri katoj, nu, ĝi estas bonega! Mi ne povas mem legi aŭ skribi — se mi povus, eble *mi* verkus librojn. Sed mia edzino Teodosio, ja ŝi estas klerulo. Kaj ŝi voĉlegis vian libron al mi. Nu, ĝi estas bonega — ne eblas uzi alian vorton — bonega. Vi kvazaŭ

mem estas kato. Vi scias kiel ili pensas. Kaj atentu: vi povos lukri multan monon per bestokuracado. Ĉu vi scias tion? Jene: mi sendos al vi ĉiujn maljunulinojn kiuj havas malsanajn katojn kaj hundojn. Kaj se ili ne malsaniĝos sufiĉe rapide, mi povos meti ion en la viandon kiun mi vendas por malsanigi ilin, ĉu ne?"

"Ho ne," rapide diris la Doktoro. "Nepre ne faru tion. Tio ne estus justa."

"Nu, mi ne volis diri ke mi grave malsanigus ilin," respondis la Por-kata Viandovendisto. "Nur ion por iomete malvigligi ilin, tion mi celis. Sed kiel vi diras, eble ne estus tute juste rilate al la bestoj. Sed ĉiukaze ili malsaniĝos, ĉar la maljunulinoj ĉiam donas al ili tro por manĝi. Kaj jen, ĉiuj farmistoj en la regiono kiuj havas lamajn ĉevalojn kaj malfortajn ŝafidojn — ili venus. Estu kuracisto por bestoj."

Kiam la Por-kata Viandovendisto estis foririnta, la papago flugis de la fenestro sur la tablon de la Doktoro kaj diris:

"Tiu viro estas prudenta. Vi devus fari tion. Estu kuracisto por bestoj. Rezignu pri la stultaj

homoj — se ili ne kapablas kompreni ke vi estas la plej kapabla kuracisto en la mondo. Prizorgu bestojn anstataŭe — *ili* baldaŭ scios. Estu kuracisto por bestoj."

"Ho, jam abundas kuracistoj por bestoj," diris Johano Dolittle, metante la florpotojn sur la eksteran fenestrobreton por ke ilin trafu la pluvo.

"Jes, vi pravas, ili *abundas*," diris Polinezio. "Sed inter ilin, ne eĉ unu estas kompetenta. Sed atentu, Doktoro, kaj mi informos vin pri io. Ĉu vi sciis ke la bestoj kapablas paroli?"

"Mi sciis ke la papagoj kapablas paroli," diris la Doktoro.

"Ho, ni la papagoj povas paroli per du lingvoj — la lingvo de homoj kaj la birdolingvo," diris Polinezio fiere. "Se mi diras, 'Polinjo volas biskviton', vi komprenas min. Sed aŭskultu ĉi tion: *Ka-ka oi-ii, fi-fi?*"

"Jadi!" kriis la Doktoro. "Kion tio signifas?"

"Ĝi signifas, 'Ĉu la kaĉo jam estas varma?' en la birdolingvo."

"Ha! Ĉu ja vere?!" diris la Doktoro. "Neniam antaŭ nun vi parolis al mi tiel."

“Kiel utilus?” diris Polinezio, skuante kelkajn biskviteretojn de sia maldekstra flugilo. “Vi ja ne komprenus min, se mi dirus ĝin.”

“Diru plion al mi”, diris la Doktoro, tute ekscitite; kaj li hastis al tirŝranko kaj revenis kun la notlibro de la viandisto kaj kun krajono. “Sed ne tro rapide — kaj mi skribos ĝin. Estas interese — tre interese — io tute nova. Diru al mi la birdan Abocon unue — sed ne tro rapide.”

Kaj tiel la Doktoro eksciis ke la bestoj havas propran lingvon kaj povas interparoladi. Kaj tiun tutan posttagmezon, dum pluvis, Polinezio sidis sur la tablo en la kuirejo kaj diktis birdovortojn por ke li skribu ilin en la libro.

Je la manĝohoro, kiam la hundo, Jipo, envenis, la papago diris al la Doktoro, “Vidu, *li* parolas al vi”.

“Ŝajnas al mi ke li gratas sian orelon”, diris la Doktoro.

“Sed bestoj ne ĉiam parolas per sia buŝo”, diris la papago per alta voĉo, kun la brovoj levitaj. “Ili parolas per siaj oreloj, per siaj piedoj, per siaj vostoj — per ĉio. Kelkafoje ili *volas* ne fari bruon.

Ĉu vi vidas nun kiel li tikas unu flankon de sia nazo?"

"Kion tio signifas?" demandis la Doktoro.

"Tio signifas, 'Ĉu vi ne vidas ke ĉesis pluvi?' Polinezio respondis. "Li demandas al vi. Hundoj preskaŭ ĉiam demandas per siaj nazoj."

Post kelka tempo, per la helpo de la papago, la Doktoro sukcesis lerni la lingvon de la bestoj tiom bone ke li mem povis paroli al ili kaj kompreni ĉion diritan de ili. Tiam li tute rezignis esti kuracisto por homoj.

Tuj kiam la Por-kata Viandovendisto diris al ĉiuj ke Johano Dolittle fariĝos kuracisto por bestoj, la maljunulinoj komencis venigi al li siajn dorlotmopsojn kaj -pudelojn kiuj manĝis tro da kuko; kaj farmistoj venis multajn kilometrojn por montri al li malsanajn bovinojn kaj ŝafojn.

Unu tagon plugĉevalo estis venigita al li; kaj la povrulo ĝojegis trovi viron kiu povas paroli per la ĉevallingvo." Sciu, Doktoro", diris la ĉevalo, "tiu veterinaro trans la monteto scias tute nenion. Li kuracadas min jam de ses semajnoj — kontraŭ spavino. Kion mi bezonas estas *okulvitroj*. Unu

okulo mia fariĝas blinda. Kial ĉevaloj ne surhavu okulvitrojn, same kiel homoj? Sed tiu stultulo transmonteta eĉ ne rigardis miajn okulojn. Li konstante donis al mi grandajn pilolojn. Mi penis diri al li; sed li ne povis kompreni eĉ unu vorton de la ĉevallingvo. Kion mi bezonas estas okulvitroj."

"Kompreneble — kompreneble", diris la Doktoro. "Mi tuj preparigos ilin por vi."

"Mi volas paron similan al via", diris la ĉevalo — "sed verdan. Ili fortenos la sunbrilon el miaj okuloj dum mi plugos la Dudek-Hektaran Kampon."

"Certe", diris la Doktoro. "Verdajn vi ricevos."

"Sciu, kio kaŭzas problemojn, sinjoro", diris la plugĉevalo dum la Doktoro malfermis la antaŭan pordon por ke li eliru — "kaŭzas problemojn ke *ĉiu ajn* kredas sin kapabla kuraci bestojn — nur ĉar la bestoj ne plendas. Efektive, oni devas esti multe pli lerta por esti vere bona kuracisto por bestoj, ol por esti bona kuracisto por homoj. La knabo dungita de mia farmisto kredas scii ĉion pri ĉevaloj. Se nur vi povus vidi lin — lia vizaĝo estas

tiom dika ke li aspektas kvazaŭ ne havanta okulojn — kaj lia cerbo estas tiom granda kiom terpomo. Li provis meti mustardo-plastron sur min, la pasintan semajnon."

"Sur kion li metis ĝin?" demandis la Doktoro.

"Ho, li metis ĝin sur nenion — ne sur min", diris la ĉevalo. "Li nur provis. Mi piedbatis lin en la anaslageton."

"Ho, ho!" diris la Doktoro.

"Mi estas sufiĉe kvieta ulo, kutime", diris la ĉevalo — "tre pacienca, rilate al la homoj — ne multe plendas. Sed estis sufiĉe aĉe ke tiu veterinaro donis al mi malĝustan medikamenton. Kaj kiam tiu ruĝvizaĝa bubaĉo komencis mistrakti min, mi tute ne povis plu elteni."

"Ĉu vi multe damaĝis la knabon?" demandis la Doktoro.

"Ho, ne", diris la ĉevalo. Mi piedbatis la ĝustan parton de li. La veterinaro kuracas lin nun. Kiam miaj okulvitroj estis pretaj?"


"Mi havos ilin por vi venontsemajne", diris la Doktoro. "Revenu marde — Ĝis!"

Do Johano Dolittle akiris tre bonkvalitan

grandan paron da verdaj okulvitroj; kaj la okulo de la plug-ĉevalo ne plu fariĝis blinda, kaj denove li povis vidi perfekte.

Kaj baldaŭ fariĝis kutime ke oni vidis farm-bestojn kun okulvitroj en la regiono ĉirkaŭ Puddleby; kaj blinda ĉevalo estis tute ne trovebla.

Kaj simile estis pri ĉiuj aliaj bestoj venigitaj al li. Tuj kiam ili trovis ke li povas paroli per ilia ling-




Denove li povis vidi perfekte

gvo, ili diris al li kie troviĝas la doloro kaj kian senton ili havas, kaj kompreneble estis facile por li resanigi ilin.

Nu, kiam ĉiuj tiuj bestoj reiris kaj diris al siaj gefratoj kaj amikoj ke estas kuracisto en la malgranda domo kun la granda ĝardeno kiu *vere* estas kuracisto. Kaj kiam ajn iu besto mal-

saniĝis — ne nur ĉevaloj kaj bovinoj kaj hundoj — sed ĉiuj malgrandaj bestoj de la kamparo, kiaj rikoltomusoj kaj arvikoloj, meloj kaj vespertoj, ili tuj venis al lia domo ĉe la rando de la vilaĝo, tiel ke lia granda ĝardeno estis preskaŭ ĉiam plenplena de bestoj dezirantaj eniri por konsulti lin.




"Ili tuj venis al lia domo ĉe la rando de la vilaĝo."

Tiom da bestoj venis ke li devis pretigi specialajn pordojn por la diversaj specoj. Li skribis "ĈEVALOJ" sur la antaŭa pordo, "BOVINOJ" super la flanka pordo, kaj "ŜAFOJ" sur la pordo de la kuirejo. Ĉiu speco de besto havis propran pordon — eĉ por la musoj li farigis etan tunelon

en la kelon, kie ili pacience atendis en vicoj ĝis la Doktoro venos ekzameni ilin.

Tiel, post nur kelkaj jaroj, ĉio vivanta en la multakilometra ĉirkaŭaĵo eksciis pri Johano Dolittle, M.D. Kaj la birdoj kiuj flugis al aliaj landoj dum la vintro informis la bestojn en fremdaj landoj pri la mirinda kuracisto en Puddleby-sur-la-Marĉo, kiu povas kompreni ilian parolon kaj helpi ilin pri iliaj problemoj. Tiumaniere li famiĝis inter la bestoj — en la tuta mondo — pli bone konata eĉ ol antaŭe inter la homoj de la okcidenta regiono. Kaj li estis tre feliĉa, kaj al li lia vivo tre multe plaĉis.

Unu posttagmezon kiam la Doktoro estis tre okupata per skribado en libro, Polinezio sidis en la fenestro — kiel preskaŭ ĉiam — rigardante la foliojn bloviĝantajn en la ĝardeno. Baldaŭ ŝi laŭte ridis.

"Kio estas, Polinezio?" demandis la Doktoro, suprenrigardante de sia libro.

"Mi nur pensadis," diris la papago; kaj ŝi plu rigardadis la foliojn.

"Pri kio vi pensadis?"

“Mi pensadis pri la homoj” diris Polinezio. “La homoj naŭzas min. Ili tiom kredas sin mirindaj. La mondo ekzistas jam de miloj da jaroj, ĉu ne? Kaj la solan eron de besto-lingvo kiun la *homoj* lernis kompreni estas ke kiam hundo svingas sian voston li volas komuniki ‘mi estas feliĉa’! — strange, ĉu ne? Vi estas la unike sola homo kiu parolas kiel ni. Ho, kelkafoje la homoj ege ĉagrenas min — ili tiom arogantas — oni parolas pri ‘la senintelektaj bestoj’. *Senintelektaj!* Hu! Ja iam mi konis araon kiu povis diri ‘Bonan matenon!’ sepmaniere tute sen malfermi sian buŝon. Li sciis paroli ĉiun lingvon — kaj la grekan. Olda profesoro kun griza barbo aĉetis lin. Sed li ne restis. Li diris ke la oldulo malĝuste parolis la grekan, kaj li ne povis toleri aŭskulti lin misinstrui la lingvon. Ofte mi demandas al mi kio poste okazis al li. Tiu birdo sciis pli da geografio ol iam scios la homoj. — *Homoj,* Ve! Mi supozas ke se la homoj iam lernos flugi — kion povas fari ĉiu ordinara pronelo — ni senĉese devos aŭdadi pri ĝi!”

“Vi estas sagaca olda birdo”, diris la Doktoro.

"Kiom aĝa vi efektive estas? Mi scias ke papagoj kaj elefantoj kelkafoje vivas tre tre longan tempon."

"Mi ne estas tute certa pri mia aĝo", diris Polinezio. "Mi estas aŭ cent-okdek-tri-jaraĝa aŭ cent-okdek-du-jaraĝa. Sed mi scias ke kiam mi unue venis ĉi tien el Afriko, Reĝo Karlo ankoraŭ estis kaŝita en la kverko — ĉar mi vidis lin. Li aspektis timoplenega".

## 3. PLI DA MON-PROBLEMOJ




AĈETIS novan robon Sarao, la fratino de la Doktoro, ĉar nun li baldaŭ komencis denove lukri monon, kaj ŝi feliĉis.

Kelkaj el la bestoj kiuj venis konsulti lin estis tiom malsanaj ke ili bezonis resti ĉe la Doktoro dum tuta semajno. Kaj dum ili plisaniĝis ili kutimis sidi en seĝoj sur la gazono.

Kaj ofte eĉ post ilia resaniĝo, ili ne volis foriri — tiom ili amis la Doktoron kaj lian domon. Kaj li ĉiam estis tro bonkora por forsendi ilin kiam ili petis resti kun li. Do tiel li pli kaj pli gajnis dorlotbestojn.

Unufoje dum li sidis sur sia ĝardenmuro, fumante pipon dum la vespero, itala gurdisto vidiĝis kondukanta simion ligitan per ŝnuro. La Doktoro tuj vidis ke la kolumo de la simio estas tro streĉita kaj ke li estas malpura kaj malfeliĉa. Do li forprenis la simion de la italo, donis ŝilingon

al la viro kaj ordonis ke li foriru. La gurdisto koleregis kaj diris ke li volas restigi la simion kun si. Johano Dolittle diris al li ke se li ne foriros, li pugnobatos lian nazon. Johano Dolittle estis forta viro, eĉ kvankam li ne estis tre alta. Do la italo foriris dirante fiajn vortojn kaj la simio restis kun Doktoro Dolittle kaj havis bonan hejmon. La aliaj bestoj en la domo nomis lin "Ĉi-Ĉio" — kio estas



Ili kutimis sidi en seĝoj sur la gazono.

kutima vorto en la similingvo, kaj signifas "zingibro".

Kaj alifoje, kiam cirko venis al Puddleby, la krokodilo, kiun afliktis granda dentodoloro, eskapis dum la nokto kaj venis en la ĝardenon de la Doktoro. La Doktoro parolis al li en la krokodil-lingvo kaj prenis lin en la domon kaj resanigis lian denton. Sed kiam la krokodilo vidis kiom alloga estas la domo — kun la diversaj lokoj por la multaj

diversaj specoj de bestoj — ankaŭ li volis loĝi kun la Doktoro. Li petis dormi en la fiŝlageto ĉe la finaĵo de la ĝardeno, kaj promesis ne manĝi la fiŝojn. Kiam la cirkistoj venis repreni lin li fariĝis tiom sovaĝa kaj minaca ke li fortimigis ilin. Sed al ĉiu en la domo li ĉiam estis milda kiel katido.

Sed nun la maljunulinoj ektimis sendi siajn dorlothundetojn al Doktoro Dolittle pro la krokodilo; kaj la farmistoj rifuzis kredi ke li ne manĝos la ŝafidojn kaj malsanajn bovidojn alportitajn por esti kuracataj. Do la Doktoro iris al la krokodilo kaj diris al li ke li devos reiri al sia cirko. Sed li tiom ploregis, kaj tiom petegis rajti resti, ke la Doktoro estis tro bonkora por forsendi lin.

Do tiam la fratino de la Doktoro venis al li kaj diris:

"Johano, vi nepre devas forsendi tiun beston. Nun la farmistoj kaj la maljunulinoj timas sendi siajn bestojn al vi — ĝuste kiam ni komencis denove havi sufiĉan monon. Nun ni plene perdos nian monon. Temas pri la plej nepra problemo. Mi ne plu mastrumados la domon por vi se vi ne

forsendos tiun aligatoron."

"Ĝi ne estas aligatoro", diris la Doktoro — "ĝi estas krokodilo".

"Ne gravas kiel vi nomas ĝin", diris lia fratino. "Estas aĉe trovi ĝin sub la lito. Mi rifuzas ke ĝi estu en la domo."

"Sed li promesis al mi", la Doktoro respondis, "ke li neniun mordos. Al li malplaĉas la cirko; kaj mi ne havas sufiĉan monon por resendi lin al Afriko, el kie li venis. Li vivas propran vivon kaj ĝenerale estas tute bonkonduta. Ne tiom ĉagreniĝu."


"Mi diras al vi ke mi *rifuzas* ke li estu ĉi tie", diris Sarao. "Li manĝas la linoleumon. Se vi ne forsendos lin tujtuje mi — mi foriros edziniĝi!"

"Bone", diris la Doktoro, "foriru edziniĝi. Estas neeviteble". Kaj li prenis sian ĉapelon kaj eliris en la ĝardenon.

Do Sarao Dolittle pakis siajn posedaĵojn kaj foriris; kaj la Doktoro restis tute sola kun sia bestofamilio. Kaj tre baldaŭ li estis eĉ pli malriĉa ol iam antaŭe. Pro la multaj buŝoj manĝigendaj, kaj la domo mastrumenda, kaj neniu kapabla fliki

vestojn, kaj neniom da mono lukrata por pagi la buĉiston, ĉio komencis ŝajni tre malfacila. Sed tio tute ne malkvietigis la Doktoron.

"Mono estas ĝenaĵo", li kutimis diri. "Ni multe pli bone status se la mono neniam estus inventita. Kiel gravas la mono, se ni estas feliĉaj?"




"Bone", diris la Doktoro, "foriru edziniĝi.

Sed baldaŭ la bestoj mem komencis maltrankviliĝi. Kaj unu vesperon dum la Doktoro dormis en sia seĝo antaŭ la kameno en la kuirejo, ĉiu manĝos ne pli ol unufoje en la tago.

Tiam la papago diris, "Mi opinias ke ni devus mem fari la mastrumadon. Ni povas fari almenaŭ tion. Ja vere, la oldulo nur pro ni trovas sin tiom

sola kaj tiom senmona".

Do ili interkonsentis ke la simio, Ĉi-Ĉio prizorgos la kuiradon kaj la vestoflikadon; la hundo balaados la plankojn; la anaso senpolv-



Unu vesperon dum la Doktoro dormis en sia seĝo.

igados kaj netigos la litojn; la strigo, Tu-Tuoprizorgos la kontojn, kaj la porko prizorgos la ĝardenon. Ili decidis ke Polinezio, la papago estos la dommastrino kaj la lavistino, ĉar ŝi estas la plej aĝa.

Kompreneble ili ĉiuj trovis siajn novajn taskojn tre malfacilaj — ĉiuj escepte de Ĉi-Ĉio, kiu havis manojn kaj povis labori same kiel homo. Sed ili baldaŭ kutimiĝis; kaj ili opiniis ke estas tre amuze rigardi Jipon, la hundon, dum li transiradis la plankon kun ĉifono ligita al la vosto por balai. Post kelka tempo ili tiom sukcesis fari siajn taskojn ke la Doktoro diris ke neniam antaŭe lia domo estis tiom neta aŭ tiom pura.

Tiel la vivo daŭris sufiĉe bone dum kelka tempo; sed sen mono ili trovis ke estas tre malfacile.

Post tio la bestoj faris legom- kaj flor-standon ekster la barilo de la ĝardeno kaj vendadis rafanojn kaj rozojn al la preterpasantoj.

Sed ankoraŭ ŝajne ne envenis sufiĉa mono por pagi ĉiujn fakturojn — kaj ankoraŭ la Doktoro ne malkvietiĝis. Kiam la papago venis al li kaj informis lin ke la fiŝvendisto rifuzas plu provizi al ili fiŝojn, li diris: “Ne gravas. Dum la kokinoj plu demetos ovojn kaj la bovino provizos al ni lakton, ni povos manĝi omletojn kaj kazeaĵojn. Kaj restas ankoraŭ multaj legomoj en la ĝardeno. La Vintro

venos nur post monatoj. Ne maltrankvilu. Maltrankvilado estis problemo de Sarao — ĉiam ŝi estis malkvieta. Mi emas scivoli pri ŝia sorto — indega virino — kelkrilate — nu, nu!”

Sed la neĝo venis tiujare pli frue ol kutime; kaj kvankam la maljuna lama ĉevalo altiris multajn ŝtipojn el la arbaro ekster la vilaĝo tiel ke ili povis estigi bonan fajron en la kuirejo, la plejmulto el la legomoj en la ĝardeno ne plu ekzistis, kaj la restantaj legomoj estis kovritaj de neĝo; kaj multaj el la bestoj estis vere malsataj.

# 4. MESAĜO EL AFRIKO

TIU VINTRO estis treege malvarma. Kaj unu nokton en decembro, dum ili ĉiuj sidis ĉe la varma fajro en la kuirejo, kaj la Doktoro voĉlegadis al ili pecojn el libroj, kiujn li mem estis verkinta en la bestolingvo, la strigo, Tu-Tuo, subite diris:

"Ĉit! Kia bruo venas el ekstere?"

Ili ĉiuj aŭskultis; kaj baldaŭ ili aŭdis la sonon de kuranto. La pordo ekmalfermiĝis kaj la simio, Ĉi-Ĉio, enkuris, severe senspira.

"Doktoro!" li kriis, "Mi ĵus ricevis mesaĝon senditan de kuzo mia en Afriko. Estas terura malsano inter la simioj tie. Ili ĉiuj malsaniĝas — kaj ili mortas multecentope. Ili aŭdis pri vi, kaj petegas ke vi venu al Afriko por ĉesigi la malsanon."

"Kiu alportis la mesaĝon?" demandis la Doktoro, deprenante siajn okulvitrojn kaj demet-

ante sian libron.

"Hirundo", diris Ĉi-Ĉio. "Ŝi estas ekstere, sur la pluvobarelo."

"Venigu ŝin apud la fajron", diris la Doktoro. "Sendube ŝi estas malvarmega. La hirundoj forflugis suden antaŭ ses semajnoj!"

Do la hirundo estis envenigita, tute kunpreminta sin kaj tremanta pro la malvarmo; kaj kvankam unue ŝi iomete timis, ŝi baldaŭ varmiĝis kaj sidis sur la rando de la kamenobreto kaj komencis paroli.

Kiam ŝi finis sian parolon, la Doktoro diris: "Volonte mi irus al Afriko — precipe ĉar estas tiom aĉa vetero ĉi tie. Sed mi timas ke ni ne havas sufiĉan monon por aĉeti biletojn. Portu al mi la monkeston, Ĉi-Ĉio".

Do la simio grimpis kaj prenis ĝin de la plej supra breto de la tirkesto.


Nenio estis en ĝi — eĉ ne unu sola penco!

"Mi certis ke restas du pencoj", diris la Doktoro.

"Ja *estis*", diris la strigo. "Sed vi elspezis ĝin por aĉeti klakludilon por la bebo de tiu melo, kiam ĝiaj

dentoj komencis aperi".

"Ĉu?" diris la Doktoro — "ve, ve! Kia ĉagrenaĵo estas mono, jes ja! Nu, ne gravas. Eble se mi iros al la marbordo mi povos pruntepreni boaton kiu portos nin al Afriko. Mi iam konis mariston kiu portis sian bebon al mi kiam rubeolo afliktis ĝin. Eble li pruntedonos al ni sian boaton — la bebo resaniĝis".



"Mi certis ke restas du pencoj."

Do frue la sekvan matenon la Doktoro iris al la marbordo. Kaj kiam li revenis, li informis siajn bestojn ke ĉio estas bona — la maristo akceptis pruntedoni al ili la boaton.

Tiam la krokodilo kaj la simio kaj la papago multe ĝojis kaj komencis kanti, ĉar ili reiros al

Afriko, ilia vera hejmo. Kaj la Doktoro diris:

"Mi povos kunvenigi nur tiun trion — kiel ankaŭ Jipon la hundon, Dab-Dabon la anason, Gub-Gubon la porkon kaj la strigon Tu-Tuon. La ceteraj bestoj, ekzemple la gliroj, kaj la arvikoloj kaj la vespertoj, ili devos reiri loĝi en la kampoj kie ili naskiĝis, ĝis nia reveno. Sed ĉar la plejparto el ili tradormas la Vintron, tio ne ĝenos ilin — kaj, krome, ili ne bone fartus en Afriko."

Do tiam la papago, kiu jam antaŭe spertis longajn marvojaĝojn, komencis listi por la Doktoro ĉion kunprenendan sur la ŝipo.

"Vi devos havi multan pilot-panon", ŝi diris, "ĝi estas speco de dura pano. Kaj vi devos havi bovaĵon en dosoj — kaj ankron".

"Mi kredas ke la ŝipo havos propran ankron", diris la Doktoro.

"Nu, certigu tion", diris Polinezio, "ĉar ĝi estas gravega. Oni ne povas halti se oni ne havas ankron. Kaj vi bezonos sonorilon."

"Kiucele?" demandis la Doktoro.

"Por scii kioma horo estas", diris la papago. "Oni sonigas ĝin ĉiun horduonon kaj tiel oni scias

kioma horo estas. Kaj kunprenu multe da ŝnurego — ĝi ĉiam utilas dum vojaĝoj".


Tiam ili komencis demandi al si: el kie ili akiros sufiĉan monon por aĉeti ĉion bezonan.

"Ho, veege! Denove mono", kriis la Doktoro. "Jadi! Volonte mi atingos Afrikon kie ni ne bezonos monon! Mi iros peti al la manĝaĵisto ke li atendu ricevu sian pagon ĝis mia reveno — ne, mi anstataŭe sendos la mariston por fari la peton."

Do la maristo iris paroli kun la manĝaĵisto. Kaj baldaŭ li revenis kun ĉio bezonata.

Sekve la bestoj pakis; kaj malŝaltinte la akvotubojn por ke akvo en la tuboj ne frostiĝu, kaj ferminte la ŝutrojn, ili ŝlosis la domon kaj donis la ŝlosilon al la maljuna ĉevalo kiu loĝas en la stalo. Kaj certiginte ke estas sufiĉa fojno en la fojnujo por manĝigi la ĉevalon dum la tuta Vintro, ili portis siajn pakaĵojn al la marbordo kaj surboatiĝis.

La Por-Kata Viandovendisto ĉeestis por adiaŭi ilin, kaj li alportis grandan sebopudingon donace al la Doktoro, ĉar, li diris ke oni informis lin ke ne eblas aĉeti sebopudingon en fremdaj landoj.



"Kaj la vojaĝo komenciĝis"

porko, demandis kie estas la litoj, ĉar estas la kvara horo posttagmeze kaj li volis dormi. Do Polinezio kondukis lin malsupren en la boaton kaj montris al li la litojn, ĉiu super alia, kvazaŭ librobretoj ĉe muro.

"Sed, tio ne estas lito!" kriis Gub-Gubo, "Tio estas breto!"

"La litoj en ŝipo estas ĉiam tiaj", diris la papago. "Ĝi ne estas breto. Grimpu en ĝin kaj dormu. Oni nomas ĝin 'litbenko'."

"Mi ankoraŭ ne volas enlitiĝi", diris Gub-Gubo. "Mi estas tro ekscitita. Mi volas resupreniri kaj vidi la ekiron."

"Nu, temas pri via unua vojaĝo", diris Polinezio. "Vi kutimiĝos al la enŝipa vivo post iom da tempo."

Kaj ŝi resupreniris laŭ la ŝtuparo de la ŝipo, zumante al si la jenan kanton:

*Mi vidis Nigran, Ruĝan Marojn,*
*Ĉirkaŭiris Vajt-Insulon;*
*Malkovris jam Riveron Flavan*
*Kaj l' Oranĝan Riverhulon;*
*Nun Groenlandon mi evitas,*

*Bluan akvon plu survelas —*
*Koloroj min, Janj', tro agitas,*
*Do haste mi al vi min pelas..*

Ili estis tuj komencontaj sian vojaĝon, kiam la Doktoro diris ke li devos reiri al la maristo kaj demandi kiudirekten iri por trafi Afrikon.

Sed la hirundo diris ke ŝi jam flugis al tiu lando multajn fojojn kaj gvidos ilin tien.

Do la Doktoro petis ke Ĉi-Ĉiu suprentiru la ankron kaj la vojaĝo komenciĝis.

## 5. LA GRANDA VOJAĜO

NUN dum ses plenaj semajnoj ili veladis kaj plu veladis, sur la ondanta maro, sekvante la hirundon kiu flugis antaŭ la ŝipo por montri al ili la vojon. Nokte ŝi portis lanterneton, tiel ke ili povu vidi ŝin en la mallumo; kaj la homoj sur la aliaj ŝipoj kiuj pasis ilin diris ke sendube temas pri falstelo.

Dum ili velis pli kaj pli suden, la vetero fariĝis pli kaj pli varma. Polinezio, Ĉi-Ĉio kaj la krokodilo multe ĝuis la varmegan sunbrilon. Ili ĉirkaŭkuris ridante kaj rigardante trans la flankon de la ŝipo por vidi ĉu jam Afriko videblas.

Sed la porko kaj la hundo kaj la strigo, Tu-Tuo, nenion kapablis fari en tia vetero, escepte de sidi ĉe la finaĵo de la ŝipo, ombrumate de granda barelo, kun la langoj elpendantaj, trinkante limonadon.

Dab-Dabo, la anaso, kutimis malvarmigi sin

per salto en la maron kaj naĝado malantaŭ la ŝipo. Kaj fojfoje, kiam ŝia kapo tro varmiĝis, ŝi plonĝis sub la ŝipon kaj malplonĝis ĉe la alia flanko. Ankaŭ tiel ŝi kaptadis haringojn ĉiumarde kaj ĉiuvendrede — kiam ĉiuj sur la boato manĝis fiŝojn por ne formanĝi la bovaĵon.

Kiam ili proksimiĝis al la Ekvatoro ili vidis kelkajn flugfiŝojn veni iliadirekten. Kaj la fiŝoj demandis al la papago ĉu jen la ŝipo de Doktoro Dolittle. Kiam ŝi jesis, ili diris ke tio ĝojigas ilin, ĉar la simioj en Afriko komencas dubi ĉu efektive li ja venos al ili. Polinezio demandis kiom da kilometroj ili devos plu veli; kaj la flugfiŝoj diris ke nun restas nur cent kilometroj por veli ĝis Afriko.

Kaj alian fojon granda grego da focenoj venis dancante tra la ondoj; kaj ankaŭ ili demandis al Polinezio ĉu jen la ŝipo de la fama kuracisto. Kaj aŭdinte ŝian jeson, ili demandis al la papago ĉu la Doktoro bezonas ion por sia vojaĝo.

Kaj Polinezio diris, "Jes. Ni ne plu havas cepojn."

"Estas insulo ne tre malproksime de ĉi tie", diris la focenoj, "kie la sovaĝaj cepoj kreskas altaj kaj

fortikaj. Plu velu rekte antaŭen — ni akiros kelkajn kaj portos ilin al vi.

Do la focenoj forrapidis tra la maro. Kaj tre baldaŭ la papago revidis ilin veni malantaŭ la ŝipo, trenante la cepojn tra la ondoj en grandaj retoj el laminario.

La sekvan vesperon, dum la suno malleviĝis, la Doktoro diris:

"Alportu la teleskopon al mi, Ĉi-Ĉio. Nia vojaĝo preskaŭ finiĝis. Tre baldaŭ ni povos vidi la bordon de Afriko."

Kaj ĉirkaŭ duonon da horo poste, ili ja kredis povi vidi ion antaŭan kiu eble estas tero. Sed komencis fariĝi pli kaj pli mallume, kaj ili ne povis esti certaj.

Tiam ekkomenciĝis granda ŝtormo, tondris kaj fulmis. La vento hurlis, la pluvo torentis, kaj la ondoj tiom altis ke ili transplaŭdis la boaton.

Baldaŭ sonegis granda BAM! La ŝipo ekhaltis kaj surflankiĝis.


"Kio okazis? demandis la Doktoro, suprenvenante.

"Mi ne certas", diris la papago, "Sed mi kredas

ke ni averiis. Petu la anason eliri por certigi".

Do Dab-Dabo plonĝis rekte sub la ondojn. Kaj kiam ŝi estis reveninta, ŝi diris ke ili koliziis kun roko; estas granda truo en la planko de la ŝipo, la akvo enfluas, kaj la ŝipo rapide sinkas.

"Sendube ni koliziis kun Afriko", diris la



"Sendube ni koliziis kun Afriko."

Doktoro. "Ve, ve! Nu — ni ĉiuj devos naĝi al latero."

Sed Ĉi-Ĉio kaj Gub-Gubo ne kapablis naĝi.

"Alportu la ŝnuregon!" diris Polinezio. "Mi ja diris ke ĝi estos utila. Kie estas tiu anaso? Venu ĉi tien, Dab-Dabo. Prenu ĉi finaĵon de la ŝnurego,

flugu al la bordo kaj ligu ĝin al palmarbo; kaj ni tenos la alian finaĵon sur la ŝipo ĉi tie. Tiel kiu ne kapablas naĝi devos grimpadi laŭlonge de la ŝnurego ĝis atingi la teron. Oni nomas tion 'viv-kablo'".

Tiel ili ĉiuj sekure atingis la bordon — kelkaj naĝis, kelkaj flugis; kaj tiuj kiuj grimpis laŭlonge de la kablo kunportis la kofron kaj la valizon de la Doktoro.

Sed la ŝipo ne plu estis uzebla — pro la granda truo en la planko; kaj baldaŭ la sovaĝa maro dispecigis ĝin kontraŭ la rokojn kaj la traboj forflosis.

Ili ĉiuj rifuĝis en plaĉa seka kavo kiun ili trovis, alta en la klifoj, ĝis la ŝtormo forpasis.

Kiam la suno rebrilis la sekvan matenon ili malsupreniris al la sabla plaĝo por sekigi sin.

"Kara olda Afriko!" suspiris Polinezio. "Estas bone reveni. Nur pensu — jam cent sesdek naŭ jarojn antaŭ morgaŭ mi foriris el ĝi! Kaj ĝi tute ne ŝanĝiĝis! — samaj oldaj palmarboj, sama olda ruĝa tero, samaj oldaj nigraj formikoj! Onia hejmo estas unika!"

Kaj la aliaj rimarkis ke estas larmoj en ŝiaj okuloj — tiom plaĉis al ŝi revidi sian landon.

La Doktoro ektrovis ke mankas lia alta ĉapelo; ĉar ĝi estis forblovita en la maron dum la ŝtormo. Do Dab-Dabo flugis serĉi ĝin. Kaj baldaŭ ŝi vidis ĝin, tre malproksime, flosantan sur la akvo kvazaŭ ludila boato.

Kiam ŝi malsupren flugis por preni ĝin, ŝi trovis blankan muson, tre timoplenan, sidanta en ĝi.

"Kial vi estas ĉi tie?" demandis la anaso. "Vi estis ordonita resti en Puddleby".


"Mi ne volis resti tie", diris la muso. "Mi volis vidi kia estas Afriko — mi havas parencojn tie. Do mi kaŝis min en la pakaro kaj estis portita sur la ŝipon kune kun la durpano. Kiam la ŝipo sinkis mi timegis — ĉar mi ne povas naĝi longadistance. Mi naĝis kiom mi povis, sed baldaŭ mi ellaciĝis kaj kredis ke mi sinkos. Kaj ĝuste tiam, tiumomente, la ĉapelo de la maljunulo venis flosante; kaj mi eniris ĝin ĉar mi ne volis droni."

Do la anaso prenis la ĉapelon en kiu estas la muso kaj portis ĝin al la Doktoro sur la bordo. Kaj

ĉiuj kungrupiĝis por rigardi.

“Oni nomas tion ‘kaŝvojaĝanto’”, diris la papago.

Baldaŭ, dum ili serĉis lokon en la kofro kie la blanka muso povos komforte veturi, la simio, Ĉi-



“Mi eniris ĝin ĉar mi ne volis droni.”

Ĉio, subite diris:

“Ĉit! Mi aŭdas piedpaŝojn en la ĝangalo!”

Ili ĉiuj haltis por aŭskulti. Kaj baldaŭ nigrulo venis el la arbaro kaj demandis al ili kial ili estas tie.

“Mi nomiĝas Johano Dolittle — M.D.”, diris la Doktoro. “Mi estis petita veni al Afriko por kuraci la malsanajn simiojn”.


“Vi ĉiuj devos veni antaŭ la Reĝon”, diris la nigrulo.

Kiu reĝo?” demandis la Doktoro, kiu ne volis malŝpari tempon.

“La Reĝo de la Ĝoliginkioj”, la viro respondis. “Ĉi ĉiuj terenoj apartenas al li; kaj ĉiuj fremduloj devas esti kondukitaj antaŭ lin. Sekvu min.”

Do ili kunigis siajn pakojn kaj foriris, sekvante la viron tra la ĝangalo.

# 5. POLINEZIO KAJ LA REĜO



KIAM ili estis iomete irintaj tra la dika arbaro, ili atingis larĝan, senarban spacon; kaj ili vidis la palacon de la Reĝo, konstruitan el koto.

Tie loĝis la Reĝo kun sia Reĝino, Ermintrudo, kaj ilia filo Princo Bumpo. La Princo forestis fiŝkaptante salmojn en la rivero. Sed la Reĝo kaj la Reĝino sidis sub ombrelo antaŭ la pordo de la palaco. Kaj Reĝino Ermintrudo dormis.

Kiam la Doktoro estis veninta al la palaco la Reĝo demandis lin pri lia celo; kaj la Doktoro informis lin pri kial li venis al Afriko. “Vi ne rajtas veturi tra miaj regionoj”, diris la Reĝo. “Antaŭ multaj jaroj blankulo venis al ĉi tiu bordo; kaj mi estis tre afabla al li. Sed fosinte truojn en la tero por akiri la oron, kaj mortiginte ĉiujn elefantojn por akiri iliajn eburajn dentegojn, li sekrete foriris

en sia ŝipo — sen eĉ diri 'Dankon'. Neniam denove blankulo veturos tra la regionoj ĝoliginkiaj".

Tiam la Reĝo turnis sin al kelkaj el la nigruloj apude starantaj kaj diris," Forprenu ĉi tiun ŝamanon — kaj ĉiujn liajn bestojn, kaj ŝlosu ilin en mian plej fortikan malliberejon."



"Kaj Reĝino Ermintrudo dormis."

Do ses el la nigruloj forkondukis la Doktoron kaj ĉiujn liajn dorlotbestojn kaj fermis ilin en ŝtonan karceron. La karcero havis nur unu malgrandan fenestron, en alta parto de la muro, kun metala stanga latiso en si; kaj la pordo estis

fortika kaj dika.

Tiam ĉiuj fariĝis tre malfeliĉaj; kaj Gub-gubo, la porko, komencis plori. Sed Ĉi-Ĉio diris ke li pugbatos lin se li ne ĉesigos tiun aĉan sonon; do li eksilentis.

"Ĉu ĉiuj el ni estas ĉi tie?" demandis la Doktoro, post sia kutimiĝo al la senlumeco.

"Jes, tion mi kredas", diris la anaso, kaj komencis kalkuli ilin.

"Kie estas Polinezio?" demandis la krokodilo. "Ŝi ne estas ĉi tie".

"Ĉu vi certas?" diris la Doktoro. "Serĉu denove. Polinezio! Polinezio! Kie vi estas?"

"Mi supozas ke ŝi eskapis", grumblis la krokodilo. "Nu, tia ŝi estas! — kaŝe foriris en la ĝangalon tuj kiam problemo trafis ŝiajn amikojn".

"Mi ne estas tia birdo", diris la Papago, grimpinte el la poŝo en la basko de la mantelo de la Doktoro. "Komprenu, mi estas sufiĉe malgranda por trairi la kradon de tiu fenestro; kaj mi timis ke ili anstataŭe metos min en kaĝon. Do dum la Reĝo estis parolanta, mi kaŝis min en la poŝo de la Doktoro — kaj jen mi! Tion oni nomas

'ruzo'", ŝi diris, glatigante siajn plumojn per sia beko.

"Jadi!" kriis la Doktoro. "Bonŝance mi ne eksidis sur vin."

"Nun atentu", diris Polinezio, "ĉinokte, tuj kiam mallumiĝos, mi puŝos min tra la barilojn de tiu fenestro kaj flugos al la palaco. Kaj tiam — vi vidos — mi baldaŭ trovos metodon devigi la Reĝon liberigi nin el la karcero".

"Ho, kion *vi* povas fari?" diris Gub-Gubo, supren turnante sian nazon kaj rekomencante plori. "Vi estas nur birdo!"

"Tute vere", diris la papago. "Sed ne forgesu ke kvankam mi estas nur birdo, *mi povas paroli same kiel homo* — kaj mi konas ĉi nigrulojn".

Do tiunokte, kiam la luno briladis tra la palmarboj kaj ĉiuj servistoj de la Reĝo dormis, la papago puŝis sin tra la kradon de la karcero kaj transflugis al la palaco. La fenestro de la manĝoŝranko estis rompita per tenispilko antaŭ semajno, kaj Polinezio trairis la truon en la vitro.

Ŝi aŭdis Princon Bumpon ronkadi en sia litĉambro ĉe la malantaŭo de la palaco. Poste ŝi

silente supreniris la ŝtupojn ĝis veni al la lit–ĉambro de la Reĝo. Ŝi zorge malfermis la pordon kaj enrigardis.

La Reĝino forestis tiunokte, ĉe balo ĉe sia kuzo, sed la Reĝo estis en la lito, profunde dormante.

Tiam ŝi tusis — precize kiel Doktoro Dolittle kutimis tusi. Polinezio povis imiti ĉiun personon.



"Kiu estas?"

La Reĝo malfermis siajn okulojn kaj diris dormeme: "Ĉu vi, Ermintrudo?" (Li supozis ke temas pri la Reĝino reveninta de la balo.)

Tiam la papago denove tusis — laŭte, same kiel viro. Kaj la reĝo eksidis, tute veka, kaj diris, "Kiu

estas?"

"Mi estas Doktoro Dolittle", diris la papago — precize kiel parolus Doktoro Dolittle.

"Kial vi estas en mia litĉambro?" kriis la Reĝo. "Kial vi aŭdacis foriri el la karcero! Kie vi estas? — Mi ne vidas vin".

Sed la papago nur ridis — longe, profunde, gaje ridis, precize kiel ridas la Doktoro.

"Ĉesu ridi kaj tuj venu ĉi tien por ke mi vidu vin", diris la Reĝo.

"Malsaĝa Reĝo!" respondis Polinezio. "Ĉu vi forgesas ke vi parolas kun Johano Dolittle, M.D. — la plej mirinda persono sur la tero? Kompreneble vi ne povas vidi min. Mi malvidebligis min. Nenion mi ne povas fari. Nun aŭskultu: Mi venis ĉi tien ĉinokte por averti vin. Se vi ne lasos min kaj miajn bestojn veturi tra via regno, mi malsanigos vin kaj ĉiujn viajn regnanojn, ili malsanos same kiel la simioj. Ĉar mi povas sanigi homojn; kaj mi povas malsanigi homojn — simple levante mian malgrandan fingron. Sendu viajn soldatojn tuj por malfermi la pordon de la karcero, alie vi suferos pro mumpso antaŭ ol la

suno leviĝos super la montetoj de Ĝoliginkiujo".

Tiam la Reĝo komencis tremi kaj multe timis.

"Doktoro", li kriis, "estos kiel vi ordonis. Bonvolu ne levi vian malgrandan fingron!" Kaj li saltis el la lito kaj kuris ordoni al la soldatoj ke ili malfermu la pordon de la karcero.

Tuj post lia foriro, Polinezio silente paŝis malsupren laŭ la ŝtuparo kaj foriris el la palaco tra la fenestro de la manĝoŝranko.

Sed la Reĝino, kiu ĝuste tiam estis malŝlosanta la malantaŭan pordon per ŝlosilo, vidis la papagon foriri tra la rompita vitro. Kaj kiam la Reĝo revenis al la lito ŝi informis lin pri kion ŝi vidis.

Tiam la Reĝo ekkomprenis ke li estis trompita, kaj li koleregis. Li tuj rerapidis al la karcero.

Sed estis tro malfrue. La pordo staris malfermite. La karcero estis malplena. La Doktoro kaj ĉiuj liaj bestoj estis foririntaj.

## 7. LA PONTO EL SIMIEGOJ



REĜINO ERMINTRUDO neniam antaŭe en sia vivo vidis sian edzon tiom kolerega kiel tiunokte. Li grincegis siajn dentojn pro kolero. Li ĵetis sian dentobrosilon kontraŭ la palackaton.

Li ĉirkaŭkuris en sia negliĝo kaj vekis sian tutan armeon kaj sendis ilin en la ĝangalon por kapti la Doktoron. Kaj li ankaŭ devigis ĉiujn siajn servistojn iri — siajn kuiristojn kaj siajn ĝardenistojn kaj sian barbiron kaj la instruiston de Princo Bumpo — eĉ la Reĝino, kiu estis laca pro dancado en paro da striktaj ŝuoj, estis forsendita por helpi la soldatojn serĉadi.

Tutdume la Doktoro kaj liaj bestoj kuradis tra la arbaro cele la Landon de la Simioj kiel eble plej rapide.

Gub-Gubo, pro siaj mallongaj kruroj, baldaŭ laciĝis; kaj la Doktoro devis porti lin — kio multe

malfacilis ĉar ili ankaŭ devis kunporti la kofron kaj la valizon.

La Reĝo de la Ĝoliginkioj kredis ke lia armeo facile trovos ilin, ĉar la Doktoro estas en fremda lando kaj ne konas la vojon. Sed li eraris; ĉar la simio, Ĉi-Ĉio, konis ĉiujn vojojn tra la ĝangalo — eĉ pli bone ol la soldatoj de la Reĝo. Kaj li gvidis la Doktoron kaj ties dorlotbestojn al la plej densa parto de la arbaro — al loko kie antaŭe estis tute neniu homo — kaj kaŝis ilin ĉiujn en granda kava arbo inter altaj rokoj.

"Plejbone estos ke ni restu ĉi tie", diris Ĉi-Ĉio, "ĝis la soldatoj estos foririntaj reenlitiĝi. Tiam ni povos plu veturi en la Landon de la Simioj".

Do tie ili restis dum la tuta nokto.

Ili ofte aŭdis la soldatojn de la Reĝo serĉi kaj paroli en la ĉirkaŭa ĝangalo. Sed ili estis tute sekuraj, ĉar neniu konis tiun kaŝejon escepte de Ĉi-Ĉio — eĉ ne la aliaj simioj.

Fine, kiam la taglumo komencis trairi la suprajn densajn foliojn, ili aŭdis Reĝinon Ermintrudon diri per tre laca voĉo ke ne utilos plu serĉadi — pli bone estos ke ili ĉiuj reiru kaj iom

dormu.

Tuj post la hejmeniro de ĉiuj soldatoj, Ĉi-Ĉio gvidis la Doktoron kaj liajn bestojn el la kaŝejo kaj ili ekveturis cele la Landon de la Simioj.

La vojo estis tre tre longa, kaj ili ofte multe laciĝis — precipe Gub-Gubo. Sed kial li ploris ili donis al li kokosan lakton, kiun li multe ŝatis.

Ili ĉiam havis multon por manĝi kaj trinki, ĉar Ĉi-Ĉio kaj Polinezio konis ĉiujn diversajn fruktojn kaj legomojn kiuj kreskas en la ĝangalo, kaj kie trovi ilin — i.a. daktilojn kaj figojn kaj arakidojn kaj zingebrojn kaj dioskoreojn. Ili faris trinkaĵon el la suko de sovaĝaj oranĝoj,dolĉigita per mielo kiun ili akiris el abelnestoj en kavaj arboj. Negrave kion ili petis, Ĉi-Ĉio kaj Polinezio ĉiam ŝajnis kapablaj akiri ĝin por ili — aŭ ion similan al ĝi. Unu tagon ili eĉ akiris iom da tabako por la Doktoro, kiam li eluzis la kvanton kiun li kunportis sin si kaj plu deziris fumadi.

Nokte ili dormis en tendoj el palmfolioj, sur dikaj molaj litoj el seka greso. Kaj post kelka tempo ili kutimiĝis al tiom da marŝado kaj ne tiom laciĝis kaj multe ĝuis la vivon de marŝado.

Sed ili ĉiam ĝojis kiam noktiĝis kaj ili haltis por sia ripozado. Tiam la Doktoro ĉiam faris malgrandan fajron per branĉetoj ; kaj manĝinte, ili kutimis sidi ĉirkaŭ ĝi en ringoforme, aŭskultante Polinezion kanti pri la maro, aŭ Ĉi-Ĉion rakonti pri la ĝangalo.

Kaj multaj el la rakontoj de Ĉi-Ĉio estis tre interesaj. Ĉar kvankam la simioj ne havis proprajn historilibrojn, antaŭ ol Doktoro Dolittle venis por verki ilin por ili, ili memoras ĉion okazintan per rakontado al siaj infanoj. Kaj Ĉi-Ĉio parolis pri multaj aferoj rakontitaj al li de lia avino — rakontoj pri antikva tempo longe longe antaŭ nun, antaŭ Noa kaj la Inundo — pri la tempo kiam la homoj vestis sin per ursofeloj kaj loĝis en truoj en la rokoj kaj manĝis sian ŝafidaĵon kruda — ĉar ili ne sciis kio estas kuirado — ĉar ili neniam vidis fajron. Kaj li rakontis al ili pri la Grandaj Mamutoj kaj Lacertoj, tiom longaj kiel trajno, kiuj vagadis trans la montojn tiutempe, mordetante la arbosupraĵojn. Kaj ofte ili tiom interesiĝis dum ili aŭskultis, ke kiam li finis siajn rakontojn ili trovis sian fajron tute pereinta, kaj ili devis ĉirkaŭserĉadi


por akiri pli da branĉetoj kaj konstrui novan.

Nu, kiam la armeo de la Reĝo reiris kaj diris al la Reĝo ke ili ne povis trovi la Doktoron, la Reĝo resendis ilin kaj diris al ili ke ili devos resti en la ĝangalo ĝis ili trovos lin. Do tutdume, dum la Doktoro kaj liaj bestoj marŝadis cele la Landon de la Simioj, kredante esti tute sekuraj, ilin ankoraŭ sekvadis la soldatoj de la Reĝo. Se Ĉi-Ĉio scius tion, li plej verŝajne denove kaŝus ilin. Sed li ne sciis.

Unu tagon Ĉi-Ĉio grimpis altan rokon kaj rigardis trans la arbosuprojn. Kaj kiam li remalsupreniris, li diris ke ili jam estas tre proksimaj al la Lando de la Simioj kaj baldaŭ estos tie.

Kaj tiun vesperon, ja vere, ili vidis la kuzon de Ĉi-Ĉio kaj multajn aliajn simiojn, kiuj ankoraŭ ne malsaniĝis, sidantaj en la arboj apud marĉo, rigardante kaj atendante ilin. Kaj kiam ili vidis la faman Doktoron efektive veni, tiuj simioj faris bruegon, huraante kaj skuante foliojn kaj svingante sin el la branĉoj por saluti lin.

Ili volis porti lian valizon kaj lian kofron kaj ĉi-



"Huraante kaj skuante foliojn kaj svigante sin el la branĉoj por saluti lin."

ĉion kion li havis—kaj unu el la pli grandaj eĉ portis Gub-Gubon, kiu denove estis laca. Kaj du el ili antaŭen rapidis por informi la malsanajn simiojn ke la granda Doktoro fine alvenis.

Sed la soldatoj de la Reĝo, kiuj ankoraŭ sekvis, aŭdis la bruon de la huraado de la simioj; kaj fine ili eksciis kie estas la Doktoro, kaj rapidis kapti lin.

La granda simio portanta Gub-Gubon venadis malrapide malantaŭe, kaj li vidis la Kapitanon de la armeo kaŝiri inter la arboj. Do li kuris por atingi la Doktoron kaj diris al li ke li kuru.

Tiam ili ĉiuj kuris pli rapide ol iam antaŭe dum siaj vivoj; kaj la soldatoj de la Reĝo, sekvantaj ilin, komencis ankaŭ kuri; kaj el ili la Kapitano plej rapide kuris.

Subite la Doktoro stumblis pro sia medikamentosako kaj falis en la koto, kaj la Kapitano pensis ke nepre li kaptos lin ĉifoje.

Sed la Kapitano havis tre longajn orelojn — kvankam lia hararo estis tre mallonga. Kaj dum li antaŭen saltis por kapti la Doktoron, unu el liaj oreloj implikiĝis en arbo; kaj la ceteraj soldatoj devis halti por helpi lin.

La Doktoro estis jam relevinta sin kaj plu ili iris, kurante kaj kuregante. Kaj Ĉi-Ĉio kriis:

“Estas bone. Ni ne bezonos iri multe pli!”

Sed antaŭ ol ili povis eniri la Landon de la Simioj ili renkontis krutegan klifon sub kiu fluadis rivero. Temis pri la limo de la Regno de Ĝoliginkiujo; kaj la Lando de la Simioj estis sur la alia flanko — trans la rivero.

Kaj Jipo, la hundo, malsupren rigardis laŭ la rando de la klifo kruta krutega klifo kaj diris:


“Ve! Kiel do ni ja povos transiri?”

“Ho ve!” diris Gub-Gubo. “La soldatoj de la Reĝo jam estas tre proksimaj — rigardu ilin! Mi timas ke ni estos reportitaj en la karceron”. Kaj li komencis plori.

Sed la granda simio kiu portis la porkon faligis lin sur la teron kaj kriis al la aliaj simioj:

“Uloj — ponton! Hastu! — Faru ponton! Jam rapidege. Ili liberigis la Kapitanon, kaj li alkuras rapide kiel cervo. Ekhastu! Ponton! Ponton!”

La Doktoro komencis demandi al si el kio ili faros ponton, kaj li ĉirkaŭrigardis por vidi ĉu ili estis kaŝintaj tabulojn ie.



"Johano Dolittle estis la lasta transmarŝanto"

Sed, kiam li rerigardis la klifon, jen pendanta trans la riveron, estis ponto tute preta por li — konsistanta el vivantaj simioj! Ĉar dum li estis turninta la dorson, la simioj — fulmorapide — faris el si ponton, simple tiel ke ĉiu tenis per siaj manoj la piedojn de alia.

Kaj la granda simio kriis al la Doktoro, "Transmarŝu! Transmarŝu — ĉiuj — hastu!"

Gub-Gubo iom timis, marŝante sur tiom mallarĝa ponto je tiu kapturna alto super la rivero. Sed li sukcese transiris; kaj ankaŭ ĉiuj aliaj sukcesis.

Johano Dolittle estis la lasta transmarŝanto. Kaj ĝuste kiam li estis atingonta la alian flankon, la soldatoj de la Reĝo venis kurante al la rando de la klifo.

Tiam ili skuegis siajn pugnojn kaj kriadis kolerege. Ĉar ili trovis sin tro malfruaj. La Doktoro kaj ĉiuj liaj bestoj estis sekuraj en la Lando de la Simioj kaj la ponto estis transtirita al la alia flako.

Tiam Ĉi-Ĉio turnis sin al la Doktoro kaj diris:

"Multaj grandaj esploristoj kaj grizbarbaj

naturistoj atendis dum longaj semajnoj kaŝinte sin en la ĝangalo por vidi la simiojn fari tiun trukon. Sed antaŭ nun ni neniam permesis blankulon ekvidi ĝin. Vi estas la unua kiu vidis la faman "Ponton de Simiegoj".

Kaj la Doktoro estis plaĉita.

# 8. LA ESTRO DE LA LEONOJ


JOHANO DOLITTLE nun fariĝis nebredeble okupatega. Li trovis centojn kaj milojn da simioj malsanaj — goriloj, ĉimpanzoj, orangutanoj, hundovizaĝaj pavianoj, hapaloj, grizaj simioj, ruĝaj — ĉiaj. Kaj multaj estis jam mortintaj.

Lia unua ago estis apartigi la malsanulojn de la sanuloj. Post tio li petis ke Ĉi-Ĉio kaj lia kuzo konstruu por li malgrandan domon el greso. Sekve, li devigis ĉiujn ankoraŭ sanajn simiojn veni por vakciniĝi.

Kaj dum tri tagoj kaj tri noktoj la simioj venadis el la ĝangaloj kaj la valoj kaj la montetoj al la malgranda domo el greso, kie la Doktoro sidis tuttage kaj tutnokte, vakcinante kaj vakcinadante.

Post tio li konstruigis duan domon — grandan domon en kiu estis multaj litoj; kaj li metis ĉiujn malsanulojn en tiu domon.


Sed tiom malsanis, ne estis sufiĉe multaj sanul-



"Li devigis ĉiujn ankoraŭ sanajn simiojn veni por vakciniĝi."

oj por flegi ilin. Do li sendis mesaĝojn al la aliaj bestoj, ekzemple la leonoj kaj la antilopoj, ke ili venu helpi pri la flegado.

Sed la estro de la Leonoj estis tre aroganta ulo. Kaj kiam li venis al la granda domo de la Doktoro, plena de litoj, li montris sin kolera kaj senestima.



"*MIN, la Reĝon de la Bestoj,* prizorgi gregon da malpuraĉaj simioj?"

"Ĉu vi aŭdacas peti min, Sinjoro?" li diris, gapante arogante al la Doktoro. "Ĉu vi aŭdacas peti min, *MIN, la Reĝon de la Bestoj,* prizorgi gregon da malpuraĉaj simioj? Ho, mi eĉ ne volus manĝi ilin inter miaj ĉefmanĝoj!"

Kvankam la leono aspektis vere timiga, la Doktoro multe klopodis ne montri timon al li. "Mi

ne petis ke vi manĝu ilin", li diris trankvile. "Kaj krome, ili ne estas malpuraj. Ili ĉiuj baniĝis ĉimatene. *Via* felo aspektas kiel multe bezonanta brosadon. Nun aŭskultu, kaj mi diros ion al vi: eble venos tago kiam la leonoj malsaniĝos. Kaj se vi ne helpos la aliajn bestojn nun, la leonoj eble trovos sin tute solaj kiam *ilin* trafos embarasoj. Tio ofte okazas al fieruloj."

"La leonojn neniam *trafas* embarasojn — ili nur embaras*ig*as aliajn bestojn", diris la Estro, suprenturnante sian nazon. Kaj li formarŝis fiere en la ĝangalon, sentante ke li estis iom sagaca kaj lerta.

Post tio ankaŭ la leopardoj arogantiĝis kaj diris ke ili rifuzas helpi. Kaj post tio, kompreneble, la antilopoj — kvankam ili estis tro retiremaj kaj timidaj por malĝentili al la Doktoro simile kiel la leonoj — *ili* piedumis la teron, kaj ridetis stulte, kaj diris ke ili ĝis nun neniam flegadis.

Kaj nun la povra Doktoro tre senespere cerbumadis, demandante al si kie trovi sufiĉajn helpantojn por prizorgi ĉiujn milojn da enlitigitaj simioj.

Sed la Estro de la Leonoj, kiam li reiris al sia loĝejo, vidis sian edzinon, la Leonreĝinon, veni al li kurante, kun sia hararo tute senorda.

"Unu el la beboj rifuzas manĝi", ŝi diris. "Mi ne scias *kion* fari por li. Li ne manĝas ekde la pasinta nokto."

Kaj ŝi komencis plori kaj skuiĝi pro nervozeco — ĉar ŝi ja estis bona patrino, eĉ kvankam ŝi estis leonino.

Do la Estro eniris sian loĝejon kaj rigardis siajn infanojn — du tre amigajn leonidojn, kuŝantajn sur la planko. Kaj unu el ili aspektis tre malsana.

Tiam la leono informis sian edzinon, tre fiere, pri precize kion li diris al la Doktoro. Kaj ŝi tiom furioziĝis ke ŝi preskaŭ forpelis lin el la loĝejo.

"Vi *neniam* havis eĉ ereton da ŝago!" ŝi kriegis. "Ĉiuj bestoj inter ĉi tie kaj la Hindia Oceano parolas pri ĉi tiu mirindulo, pri kiom afabla li estas — la sola homo en la tuta mondo kiu kapablas paroli la bestolingvon! Kaj nun, *nun* — kiam ni havas malsanan bebon, vi foriras kaj insultas lin! Vi granda stultulaĉo! Nur stultulo estas malĝentila al *bona* kuracisto. Vi —" kaj ŝi

komencis eltiri la harojn de sia edzo.

“Tuj reiru al tiu blankulo”, ŝi kriis, “kaj pardonpetu al li. Kaj kunprenu ĉiujn aliajn sen-cerbajn leonojn — kaj tiujn stultajn leopardojn kaj antilopojn. Kaj faru kion ajn al vi ordonas la Doktoro. Laboru kvazaŭ sklavoj! Kaj eble li estos sufiĉe bonvola por poste veni ekzameni la bebon. Nun ekforiru! — *Rapidu*, mi diras! Vi estas plene maltaŭga patro!”

Kaj ŝi iris al la apuda loĝejo, kie loĝis alia leonpatrino, kaj rakontis al ŝi la tutan aferon.

Do la Estro de la Leonoj reiris al la Doktoro kaj diris, “Hazarde mi venis ĉidirekte kaj ekpensis demandi. Ĉu vi jam akiris helpantojn?

“Ne”, diris la Doktoro, “neniujn. Kaj mi estas maltrankvilega”.

“Malfacilas trovi helpantojn nuntempe”, diris la leonoj. “Ŝajne la bestoj ne plu emas labori. Oni ja ne povas riproĉi ilin pro tio — nu, eble ne plene… Nu, ĉar vi havas problemojn, mi ne malvolas fari kion mi povos — nur por komplezi vin — se nur vi ne postulos ke mi lavu la ulojn. Kaj mi ordonis al ĉiuj aliaj ĉasbestoj veni kaj kunhelpi. La

leopardoj devos alveni post tre mallonge. … Ho, kaj krome, ni havas malsanan bebon en nia hejmo. Mi mem ne kredas ke io grava afliktas lin. Sed mia edzino maltrankvilas. Se vi hazarde estos en tiu loko ĉivespere, eble vi bonvolos ekzameni lin, ĉu?”

Post tio la Doktoro estis tre feliĉa; ĉar ĉiuj leonoj kaj leopardoj kaj antilopoj kaj ĝirafoj kaj zebroj — ĉiuj bestoj de la arbaro kaj la montoj kaj la ebenaĵoj — venis helpi lin kaj lian laboron. Tiom multaj venis ke li devis eĉ malakcepti kelkajn, kaj reteni nur la plej lertajn.

Kaj nun tre baldaŭ la simioj komencis resaniĝi. Je la fino de la semajno la granda domo plena de litoj estis duone malplena. Kaj je la fino de la dua semajno la lasta simio estis resaniĝinta.

Tiam la laboro de la Doktoro estis finita; kaj li estis tiom laca ke li enlitiĝis kaj dormis tri tagojn sen eĉ turni sin.

# 9. LA KONSILIO DE LA SIMIOJ




CI-ĈIO staris ekster la pordo de la Doktoro, fortenante ĉiujn ĝus li vekiĝos. Tiam Johano Dolittle diris al la simioj ke li nun devas reiri al Puddleby.

Tio multe surprizis ĉiujn; ĉar ili estis supozintaj ke li restos kun ili por ĉiam. Kaj tiun nokton ĉiuj simioj kunvenis en la ĝangalo por diskuti la aferon.


Kaj la Ĉefĉimpanzio stariĝis kaj diris:

“Kial la bona homo foriras? Ĉu li estas malfeliĉa kun ni ĉi tie?”

Sed neniu el ili povis respondi al li.

Tiam la Granda Gorilo stariĝis kaj diris: “Mi opinias ke ni ĉiuj devus iri al li kaj peti lin resti. Eble se ni konstruos por li pli grandan domon kaj pli grandan liton, kaj promesos al li multajn simiservistojn por labori por li, kaj agrabligi la vivon por li — eble tiam li ne volos foriri.”

Tiam Ĉi-Ĉio stariĝis; kaj ĉiuj aliaj flustris: "Ĉit! Vidu! Ĉi-Ĉio, la granda Vojaĝisto, estas parolonta!"



Tiam la Granda Gorilo stariĝis

Kaj Ĉi-Ĉio diris al la aliaj simioj: "Miaj amikoj, mi timas ke estus senutile peti la Doktoron resti. Li ŝuldas monon en Puddleby; kaj li diras ke li devas reiri por pagi ĝin."

Kaj la simioj demandis al li, "Kio estas *mono*?"

Tiam Ĉi-Ĉio diris al ili ke en la Lando de la blankuloj, oni povas akiri nenion sen mono; oni povas *fari* nenion sen mono — ke estas preskaŭ neeble *vivi* sen mono.

Kaj kelkaj el ili demandis, "Sed, ĉu oni ne povas eĉ manĝi kaj trinki sen pagi?"

Sed Ĉi-Ĉio kapneis. Kaj tiam li diris al ili ke eĉ li, kiam li estis kun la gurdisto, estis devigata peti

monon de la infanoj.

Kaj la Ĉefĉimpanzio turnis sin al la Plej Olda Orangutano kaj diris, “Kuzo, certe tiuj Homoj estas strangaj uloj! Kiu volus loĝi en tia lando? Jadi, kiom malinda!”

Tiam Ĉi-Ĉio diris: “Kiam ni volis veni al vi ni havis neniun boaton por transiri la maron kaj neniom da mono por aĉeti manĝaĵojn por manĝi dum nia vojaĝo. Do viro pruntedonis al ni iom da biskvitoj; kaj ni diris ke ni pagos lin kiam ni revenos. Kaj ni prunteprenis boaton de maristo; sed ĝi rompiĝis pro la rokoj kiam ni atingis la bordon de Afriko. Nun la Doktoro diras ke li devas reiri kaj akiri novan boaton por la maristo — ĉar la viro estis senmona kaj lia sola posedaĵo estis lia ŝipo.”

Kaj la simioj ĉiuj silentis dum kelka tempo, sidante tute senmove sur la tero kaj pensegante.

Fine la Plejgranda Paviano stariĝis kaj diris:

“Mi opinias ke ni nepre devas ne lasi ĉi bonan homon foriri el nia lando antaŭ ol ni donos al li belan donacon por kunpreni, tiel ke li scios ke ni estas dankaj pro ĉio kion li faris por ni.”

Kaj malgranda ruĝa simio kiu estis sidanta en arbo elkriis:

"Mi same opinias!"

Kaj tiam ili ĉiuj elkriis, farante grandan bruon, "Jes, jes. Ni donu al li la plej belan donacon kiun iam ricevis Blankulo!"

Nun ili komencis pripensi kaj interdemandi kio estus la plej bona donaco por li. Kaj unu diris, "Kvindek sakoj da kokosoj!" Kaj alia — "Cent arojn da bananoj! — li almenaŭ ne bezonos aĉeti fruktojn por si en la Lando Kie Oni Pagas por Manĝi!"

Sed Ĉi-Ĉio diris al ili ke ĉiuj tiaĵoj estus tro pezaj por tiom longa portado kaj putriĝus antaŭ ol eĉ duono da ili estus manĝita.

"Se vi volas plaĉi lin", li diris, "donu al li beston. Vi povas certi ke li afable pritraktos ĝin. Donu al li iun raran beston kiu ne troveblas en la menaĝerioj."

Kaj la simioj demandis al li, "Kio estas *menaĝerioj*?"

Tiam Ĉi-Ĉio klarigis al ili ke menaĝerioj estas lokoj en la Lando de la Blankuloj kie oni tenas

bestojn en kaĝoj por ke homoj povu veni rigardi ilin. Kaj la simioj tre ŝokite diris unu al la alia:

"Tiuj Homoj estas kvazaŭ malsaĝaj junuloj — stultaj kaj facile amuzataj. Ĉit! Li parolas pri malliberejo."

Do tiam ili demandis al Ĉi-Ĉio kian raran beston ili povus doni al la Doktoro — kian la Blankuloj neniam antaŭe vidis. Kaj la Majoro de la Hapaloj demandis:

"Ĉu ili havas igvanon tie?"

Sed Ĉi-Ĉio diris, "Jes, en la Londona Zoologia Ĝardeno".

Kaj alia demandis, "Ĉu ili havas okapion?"

Sed Ĉi-Ĉio diris, "Jes. En Belgujo, kien mia gurdisto kondukis min antaŭ kvin jaroj, oni havis okapion en granda urbo nomata Antverpeno".

Kaj alia demandis, "Ĉu ili havas puŝumi-tiruvion?"

Tiam Ĉi-Ĉio diris, "Ne. Neniu Blankulo iam vidis puŝumi-tiruvion. Ni donu al li tion".

## 10. LA PLEJEGE PLEJ RARA BESTO

PUŜUMI-TIRUVIOJ nun ne plu ekzistas. Ili ĉiuj formortis antaŭ jaroj. Sed antaŭ tre longe, kiam Doktoro Dolittle vivis, kelkaj el ili plu restis en en la plej profundaj ĝangaloj de Afriko; kaj eĉ tiam ili estis malmultegaj.

Ili ne havis voston, tamen kapon ĉe ĉiu finaĵo, kun akraj kornoj sur ĉiu kapo. Ili estis ege timidaj kaj tre malfacilege estis kapti ilin. La nigruloj kutime kaptis bestojn kaŝe sekvante ilin dum ili ne rigardas. Sed oni ne povis agi tiel pri puŝumi-tiruvio ĉar, negrave el kiu direkto oni venis al li, li ĉiam frontis al vi. Kaj krome, nur duono da li dormis je iu tempo. La alia kapo ĉiam estis veka — kaj rigardanta. Tial oni neniam kaptis ilin kaj neniam vidis ilin en zoologiaj ĝardenoj. Kvankam multaj el la plej gravaj ĉasistoj kaj la plej lertaj menaĝeriistoj uzis jarojn el sia vivo

traserĉante la ĝangalojn en ĉia vetero, eĉ ne unu el la bestoj iam estis kaptita. Eĉ tiam, antaŭ multaj jaroj, li estis la sola besto en la mondo kiu havis du kapojn.

Nu, la simioj komencis ĉasi ĉi tiun beston tra la arbaro. Kaj irinte multegajn kilometrojn, unu el la simioj trovis kuriozajn piedospurojn apud la bordo de rivero; kaj tiel ili sciis ke puŝumi-tiruvio nepre estas tre proksima al tiu loko.

Tiam ili plu iris laŭ la bordo de la rivero iom kaj ili ekvidis lokon kie la herbo estas alta kaj densa; kaj ili divenis ke li estas en tie.

Do ili ĉiuj tenis la manon unu de la alia kaj estigis grandan rondon ĉirkaŭ la alta herbo. La puŝumi-tiruvio aŭdis ilin veni, kaj li penegis trovi breĉon en la rondo de simioj. Sed li ne povis. Kiam li vidis ke ne utilas peni eskapi, li sidiĝis kaj atendis trovi kion ili volas.

Ili demandis al li ĉu li akceptos iri kun Doktoro Dolittle kaj esti montrata en la Lando de la Blank-uloj.

Sed li forte skuis nee ambaŭ siajn kapojn kaj diris, “Nepre ne!”

Ili klarigis al li ke li ne estos enfermita en menaĝerio sed estus nur rigardata. Ili diris al li ke la Doktoro estas tre afabla persono sed havas neniom da mono; kaj oni pagos por vidi dukapan beston kaj la Doktoro riĉiĝos kaj povos pagi la koston de la boato kiun li prunteprenis por veni al Afriko.

Sed li respondis, "Ne. Vi scias kiom timida mi estas — mi malamegas esti rigardata." Kaj li preskaŭ ploris.

Tiam tri tagojn ili penis persvadi lin.

Kaj je la fino de la tria tago li diris ke li venos kun ili por vidi kia homo estas la Doktoro, unue.


Do la simioj reveturis kun la puŝumi-tiruvio. Kaj veninte al la loko de la malgranda domo el greso de la Doktoro, ili frapis sur la pordon.

La anaso, kiu tiam estis pakanta la kofron, diris, "Envenu!"

Kaj Ĉi-Ĉio tre fiere kondukis la beston en la domon kaj montris lin al la Doktoro.

"Kio do ĝi povas esti?" demandis Johano Dolittle, gapante la kuriozan beston.

"Je Dio!" kriis la anaso. "Kiel ĝi povas fari decid-



Je la Dio", kriis la anaso. "Kiel ĝi povas fari decidojn?"

dojn?”

Al mi ŝajnas ke ĝi ne povus” diris Jipo la hundo.

“Ĉi tiu”, diris Ĉi-Ĉio. “estas la puŝumi-tiruvio — la plej rara besto de la afrikaj ĝangaloj, la sola dukapa besto en la mondo! Kunprenu lin hejmen kun vi kaj vi estos bonfortunega. La homoj pagos monon por vidi lin”.

“Sed mi ne volas monon”, diris la Doktoro.

“Jes ja”, diris Dab-Dabo la anaso. “Ĉu vi ne memoras kiom ni devis ŝparegadi kaj suferadi mankojn por pagi la fakturon de la buĉisto en Puddleby? Kaj kiel vi povos akiri la novan boaton por la maristo pri kiu vi parolis — krom se ni havos monon por aĉeti ĝin?”

“Mi intencis konstrui ĝin por li”, diris la Doktoro.

“Ho, nepre pensu saĝe!” kriis Dab-Dabo. “El kie vi akirus la multan lignon kaj la multajn najlojn por konstrui ĝin? — Kaj krome, per kio ni vivos? Ni estos eĉ pli malriĉaj ol antaŭe kiam ni reiros tien. Ĉi-Ĉio plene pravas: kunprenu la kuriozaĵon kun vi!”

“Nu, eble troviĝas iom da saĝo en via parolo”,

murmuris la Doktoro. “Certe ĝi estus bela nova speco de dorlotbesto. Sed ĉu la e-, a-, — kiel-ajn-ĝi-nomiĝas — vere volas iri al nova lando?”

“Jes, mi kuniros”, diris la puŝumi-tiruvio, kiu tuj vidis per la vizaĝo de la Doktoro ke li estas fidinda persono. “Vi estis tiom bonfara por la bestoj ĉi tie — kaj la simioj informas min ke mi estas la sola ebleco. Sed vi devos promesi al mi, ke se ne plaĉos al mi la Lando de la Blankuloj, vi resendos min al ĉi tie”.

“Nu, certe — kompreneble, kompreneble”, diris la Doktoro. “Pardonu min, certe vi estas parenco de la Cerva Familio, ĉu ne?”

“Jes”, diris la puŝumi-tiruvio — de la Abiseniaj gazeloj kaj la Aziaj Ĉamoj — laŭ la genealogio de mia patrino. La praprapatro de mia patro estis la lasta Unukornulo”.

“Vere interese!” murmuris la Doktoro; kaj li prenis libron el la kofro kiun Dab-Dabo estis pakanta kaj komencis turni la paĝojn. “Ni vidu ĉu *Buffon* diras ion —“

“Mi rimarkis”, diris la anaso, “ke vi parolas nur per unu el viaj buŝoj. Ĉu la alia kapo ne povas

ankaŭ paroli?"

"Ho jes", diris la puŝumi-tiruvio. "Sed mi uzas la alian buŝon por manĝado — plejparte. Tiel mi povas paroli dum mi manĝas sen esti malĝentila. Nia popolo de ĉiam estas ĝentila".

Kiam la pakado estis finita kaj ĉio estis preta por la komenco, la simioj faris grandan festenon por la Doktoro, kaj ĉiuj bestoj de la ĝangalo venis. Kaj ili havis ananasojn kaj mangojn kaj mielon kaj ĉiajn bonaĵojn por manĝi kaj trinki.

Kiam ili ĉiuj estis manĝintaj, la Doktoro stariĝis kaj diris:

"Miaj amikoj: Mi ne estas lerta rilate al parolado de multaj vortoj post la manĝo, kiaj kelkaj homoj; kaj mi ĵus manĝis multajn fruktojn kaj multan mielon. Sed mi volas diri al vi ke mi estas tre malfeliĉa pro la devo foriri de via bela lando. Ĉar mi devas fari multon en la Lando de la Blankuloj. Post mia foriro, memoru neniam permesi ke muŝoj sidos sur vian manĝaĵon antaŭ ol vi manĝis ĝin; kaj ne dormu sur la tero kiam venos la pluvoj. Mi — e-, a- — Mi esperas ke vi ĉiuj vivos feliĉe por ĉiam".

Kiam la Doktoro ĉesis paroladi kaj sidiĝis, ĉiuj simioj aplaŭdis dumlonge kaj diris unu al la alia, "Estu ĉiam memorate de nia popolo ke li sidis kaj manĝis kun ni, ĉi tie, sub la arboj. Ĉar certe li estas la Plejgranda el Ĉiuj Homoj!"

Kaj la Granda Gorilo, kies harkovritaj brakoj estis tiom fortaj kiom sep ĉevaloj, ruligis grandan rokon al la kapo de la tablo kaj diris:

"Ĉi tiu ŝtono por ĉiam indikos la lokon".

Kaj eĉ nun, en la centro de la ĝangalo, tiu ŝtono restas. Kaj simipatrinoj, trairante la arbaron kun siaj familioj, ankoraŭ indikas al ĝi el la branĉaro kaj flustras al siaj infanoj, "Ĉit! Jen ĝi — rigardu! — kie la Bona Blankulo sidis kaj manĝis kun ni dum la Jaro de la Granda Malsano!"

Tiam, post la fino de la festeno, la Doktoro kaj liaj dorlotbestoj ekkomencis reiri al la marbordo. Kaj ĉiuj simioj akompanis lin ĝis la bordo de sia lando, portante liajn kofron kaj valizojn, por adiaŭi ilin.

# 11. LA NIGRA PRINCO



BORDE de la rivero ili haltis kaj adiaŭis.

Tio daŭris longe, ĉar ĉiuj tiuj miloj da simioj volis manpremi kun Johano Dolittle.

Poste, dum la Doktoro kaj liaj dortlotbestoj marŝadis solaj, Polinezio diris:

“Ni devos treti tre zorge kaj paroli tre mallaŭte dum ni trairos la landon de la Ĝoliginkioj. Se la Reĝo aŭdos nin, li sendos siajn soldatojn por rekapti nin; ĉar mi certas ke li ankoraŭ koleras pro la trompo kiun mi faris je li”.

“Kion mi demandas al mi”, diris la Doktoro, “estas kie ni trovis novan boaton por reiri hejmen… Ho, nu, eble ni trovos boaton, kiun neniu uzas, kuŝanta sur la plaĝo. ‘Neniam levu vian piedon antaŭ ol atingi la ŝtuparon’”.

Unu tagon, dum ili pasis tra tre densa parto de la arbaro, Ĉi-Ĉio antaŭeniris por trovi kokosojn.

Kaj dum lia foresto, la Doktoro kaj la ceteraj bestoj, kiuj ne egale bone konis la ĝangalajn vojojn, perdiĝis en la profunda arbaro. Ili vagadis kaj plu vagis sed ne povis trovi vojon al la marbordo.

Ĉi-Ĉio, kiam li ne povis vidi ilin ie ajn, fariĝis ege malkvieta. Li grimpis altajn arbojn kaj elrigardis de la plej supraj branĉoj penante vidi la altan ĉapelon de la Doktoro; li skuadis manon kaj kriadis; li vokis pernome ĉiujn el la bestoj. Sed ne utilis. Ili ŝajnis estis plene perdiĝintaj.

Efektive, ili vere tre grave perdis la vojon. Ili estis vagintaj tre for de la vojo, kaj la ĝangalo estis tiom densa pro arbustoj kaj terrampaj plantoj kaj grimpoplantoj ke kelkafoje ili apenaŭ movis moviĝi, kaj la Doktoro devis elpreni sian poŝtranĉilon kaj tratranĉi sian vojon. Ili stumblis en malsekajn marĉaĵojn; ili implikiĝis en dikaj konvolvulaj stolonoj, ilin gratis dornoj, kaj dufoje ili preskaŭ perdis la medikamentosakon en la subpiedaj plantoj. Ŝajne ne estis fino de iliaj problemoj; kaj nenie ili trovis vojon.

Fine, post tia fuŝa stumblado dum multaj tagoj,

dum iliaj vestoj ŝiriĝis kaj iliajn vizaĝojn kovris koto, ili mispaŝis rekte en la malantaŭan ĝardenon de la Reĝo. La soldatoj de la Reĝo tuj venis kurante kaj kaptis ilin.

Sed Polinezio flugis en ĝardenarbon, sen esti vidita, kaj kaŝis sin. La Doktoro kaj la aliaj estis kondukitaj al la Reĝo.

“Ha! Ha!” kriis la Reĝo. “Do vi estas rekaptitaj! Ĉifoje vi ne eskapos. Konduku ilin ĉiujn en karceron kaj metu duoblajn serurojn sur la pordon. Ĉi tiu Blankulo broslavados la plankon de mia kuirejo dum lia tuta cetera vivo!”

Do la Doktoro kaj liaj dorlotbestoj estis rekondukitaj al la karcero kaj enŝlositaj. Kaj la Doktoro informiĝis ke la sekvan matenon li devos komenci broslavadi la plankon de la kuirejo.

Ili ĉiuj estis tre malfeliĉaj.

“Vere ĉagrenas”, diris la Doktoro. “Mi ja devas reiri al Puddleby. Tiu povra maristo kredos ke mi ŝtelis lian ŝipon se mi ne baldaŭ reiros hejmon… Ĉu eble ĉi ĉarniroj estas malfirmaj?”

Sed la pordo estis tre fortika kaj firme ŝlosita. Ŝajne ekzistis nenia eblo eliri. Tiam Gub-Gubo

komencis plori denove.

Tutdume Polinezio ankoraŭ sidis en la arbo en la ĝardeno de la palaco. Ŝi diris nenion kaj palpebrumadis.

Tio ĉiam estis malbona indiko rilate al Polinezio. Kiam ajn ŝi diris nenion kaj palpebrumadis, tio signifis ke iu estigadis problemojn, kaj ŝi pripensis metodon reĝustigi aferojn. Kiu estigis problemojn por Polinezio aŭ ŝiaj amikoj preskaŭ ĉiam bedaŭris tion poste.

Baldaŭ ŝi ekvidis Ĉi-Ĉion svingadi sin tra la arboj ankoraŭ serĉante la Doktoron. Kiam Ĉi-Ĉio vidis ŝin, li venis en ŝian arbon kaj demandis al ŝi kio okazis al li.

“La Doktoro kaj ĉiuj liaj bestoj estis kaptitaj de la soldatoj de la Reĝo kaj reenkarcerigitaj”, flustris Polinezio. “Ni perdis nian vojon en la ĝangalo kaj fuŝpaŝis en la ĝardenon de la palaco”.

“Sed ĉu vi ne povis gvidi ilin?” demandis Ĉi-Ĉio; kaj li komencis riproĉi la papagon ĉar ŝi permesis ke ili perdiĝu dum li forestis serĉante la kokosojn.

“Plene kulpis tiu stulta porko”, diris Polinezio.

"Li daŭre forkuris de la vojo serĉante zingebroradikojn. Kaj mi estis tiom okupata serĉante lin kaj revenigante lin, ke mi diris ke ni iru maldekstren anstataŭ dekstren, kiam ni atingis la marĉon. Ĉit! — Rigardu. Jen Princo Bumpo venanta en la ĝardenon. Li nepre ne vidu nin. Ne movu vin, tute nepre ne!"


Kaj jen, efektive, Princo Bumpo, la filo de la Reĝo, malfermanta la barilon de la ĝardeno. Li portis libron de ferakontoj sub la brako. Li venis promenante laŭ la gruza vojo, zumante malgajan kanton, ĝis li atingis ŝtonan benkon ĝuste sub la arbo kie la papago kaj la simio sin kaŝadis. Tiam li kuŝiĝis sur la benko kaj komencis legi la ferakontojn.

Ĉi-Ĉio kaj Polinezio rigardadis lin, tenante sin tute senmovaj.

Post kelka tempo la filo de la Reĝo demetis la libron kaj profunde ĝemis.

"Se nur mi estus *blanka* princo!" diris li, kun reva forenrigardanta aspekto en la okuloj.

Tiam la papago, parolante per nelaŭta, alta voĉo kvazaŭ juna knabino, diris voĉe:



“Li komencis legi la ferakontojn.”

“Bumpo, iu eble farus el vi blankan princon”.

La filo de Reĝo ekstariĝis de la benko kaj ĉirkaŭrigardis.

“Kion mi aŭdas?” li kriis. “Mi kredis ke la dolĉa muziko de la arĝenta voĉo de feino sonis de tiu laŭbo! Kurioze!”

“Inda Princo”, diris Polinezio, restante tute senmove por ke Bumpo ne vidu ŝin, “vi diras la flugantajn vortojn de la vero. Ĉar jen mi, Tripsitinko, la Reĝino de la Feinoj, parolas al vi. Mi kaŝis min en rozburĝono”.


“Ho, diru al mi, Reĝino de la Feinoj”, kriis Bumpo, kuntenante siajn manojn ĝoje, “kiu povas blankigi min?”

“En la karcero de via patro”, diris la papago, “estas fama sorĉisto, nomita Johano Dolittle. Multon li scias da medicino kaj magio, kaj multajn grandiozaĵojn li estigis. Tamen via reĝa patro lasas lin tie senzorge dum longaj longedaŭraj horoj. Iru al li, brava Bumpo, sekrete, post la sunsubiro; kaj jen, vi fariĝos la plej blanka princo kiu iam akiris belulinon! Mi parolis sufiĉe. Nun mi devas reiri al Felando. Adiaŭ!”

“Adiaŭ!” kriis la Princo. “Mil dankojn, bona Tripsitinko!”

Kaj li residiĝis sur la benkon kun rideto sur sia vizaĝo, atendante la sunsubiron.

# 12. MEDICINO KAJ MAGIO



VERE tre silente, por ke neniu vidu ŝin, Polinezio tiam kaŝe eliris malantaŭ la arbo kaj transflugis al la karcero.

Ŝi trovis Gub-Gubon puŝanta sian nazon tra la barilojn de la fenestro, penante flari la kuirodorojn venantajn el la kuirejo de la palaco. Ŝi diris al la porko ke li venigu la Doktoron al la fenestro, ĉar ŝi volas paroli kun li. Do Gub-Gubo iris veki la Doktoron kiu dormis.

“Aŭskultu”, flustris la papago, kiam la vizaĝo de Johano Dolittle videblis; “Princo Bumpo venos ĉi-nokte por renkonti vin. Kaj vi devos elpensi rimedon por blankigi lin. Sed nepre unue devigu lin promesi ke li malfermos la karcerpordon kaj trovos ŝipon por vi, per kiu vi povos transiri la maron.

“Ja tute bone”, diris la Doktoro. “Sed ne estas tiel facile blankigi nigrulon. Vi parolas kvazaŭ li

estus robo rekolorigenda. Ne estas tiel simple. 'Ĉu leopardo povas ŝanĝi siajn makulojn aŭ negro sian haŭton',* sciu.

"Mi nenion scias pri tio", diris Polinezio senpacience. "Sed vi *devas* fari tiun ulon blanka. Elpensu rimedon — pensegu. Vi havas multajn medikamentojn en la ujo. Li faros kion ajn por vi se vi ŝanĝos lian koloron. Temas pri via sola eblo eliri el la karcero".

"Nu, mi supozas ke *eble* mi povus fari tion", diris la Doktoro. "Mi pripensu — kaj li transiris al sia medikamentujo, murmurante ion pri 'liberigita kloro sur bestopigmento — eble zinka ŝmiraĵo, kiel provizora rimedo, dense surŝmirite —"

Nu, tiun nokton Princo Bumpo venis sekrete al la Doktoro en la karcero kaj diris al li: "Blankulo, mi estas malfeliĉa princo. Antaŭ jaroj mi serĉadis la Dormantan Belulinon, pri kiu mi legis en libro. Kaj veturinte multajn tagojn tra la mondo, mi fine trovis ŝin kaj kisis la damon tre milde por veki ŝin — konforme al la libro. Estas tute vere ke ŝi vekiĝis. Sed kiam ŝi vidis mian vizaĝon ŝi elkriis, 'Ho, li estas nigra!' kaj ŝi forkuris kaj rifuzis edzigi

min — kaj ekdormis en alia loko. Do mi revenis plena de malfeliĉo, al la regno de mia patro. Nu, mi informiĝis ke vi estas mirinda magiisto kaj havas multajn potencajn sorĉaĵojn. Do mi venis al vi por helpo. Se vi blankigos min, tiel ke mi povos reiri al la Dormanta Belulino, mi donos al vi duonon de mia regno kaj ĉion ceteran kion vi petos".

"Princo Bumpo", diris la Doktoro, penseme rigardante la botelojn en sia medikamentujo, "supozu ke mi bele blondigus vian hararon — ĉu tio ne estus akceptebla anstataŭe por feliĉigi vin?"

"Ne", diris Bumpo. "Nenio alia kontentigos min. Mi devas esti blanka princo".

"Sciu ke estas tre malfacile ŝanĝi la koloron de princo", diris la Doktoro "unu el la plej malfacilaj taskoj de magiisto. Vi volas ke nur via vizaĝo estu blanka, ĉu ne?"

"Jes, nur tio", diris Bumpo. "Ĉar mi surhavos brilantan kirason kaj ŝtalajn gantojn, same kiel la aliaj bankaj princoj, kaj rajdos sur ĉevalo."

"Ĉu via tuta vizaĝo devos esti blanka?" demandis la Doktoro.

"Jes, la tuto", diris Bumpo — "kaj mi volonte havus bluajn okulojn ankaŭ, sed mi supozas ke tio estus tre malfacila tasko."

"Ege malfacila", diris la Doktoro haste. "Nu, mi faros kion mi povas por vi. Vi devos esti tre pacienca, tamen — sciu ke pri kelkaj medikamentoj oni ne povas esti tute certa. Mi eble devos du- aŭ tri-foje provi. Vi havas fortikan haŭton — ĉu ne? Jes, do estas bone. Nun venu ĉi tien en la lumo — ho, sed antaŭ ol mi faros ion, vi devos unue malsupreniri al la marbordo kaj pretigi ŝipon, kun manĝaĵoj en ĝi, por porti min trans la maron. Tute ne menciu ĉi tion al iu ajn. Kaj kiam mi plenumos vian peton, vi devos liberigi min kaj ĉiujn miajn bestojn el la malliberejo. Promesu — je la krono de Ĝoliginkiujo!"

Do la Princo promesis kaj foriris por pretigi ŝipon ĉe la marbordo.

Kiam li revenis kaj diris ke li faris tion, la Doktoro petis Dab-Dabon alporti pelvon. Tiam li kunmiksis multajn medikamentojn en la pelvo, kaj diris al Bumpo ke li trempu sian vizaĝon en ĝin.

La Princo klinis sin kaj enmetis sian vizaĝon — tute ĝis la oreloj.

Li tenis ĝin tie dum longa tempo — tiom longa ke la Doktoro ŝajnis treege malkvietiĝi kaj maltrankviliĝi, starante unue sur unu kruro kaj poste sur la alia, rigardante ĉiujn botelojn kiujn li estis uzinta por la miksaĵo, kaj relegante plurfoje la etikedojn sur ili. Forta odoro plenigis la karceron, simila al la odoro de brulanta bruna papero.

Fine la Princo levis sian vizaĝon el la pelvo, spiregante. Kaj ĉiuj bestoj ekkriis surprizite.

Ĉar la vizaĝo de la Printo estis fariĝinta tiom blanka kiom neĝo, kaj liaj okuloj, kiuj antaŭe estis kotkoloroj, estis virece grizaj.

Kiam Johano Dolittle pruntis al li malgrandan spegulon por rigardi sin, li kantis ĝoje kaj komencis dancadi en la karcero. Sed la Doktoro petis lin ne fari tiom da bruo; kaj haste ferminte sian medikamentujon li petis lin malfermi la karcerpordon.

Bumpo petegis reteni la spegulon, ĉar ĝi estis la sola spegulo en la Regno Ĝoliginkiujo, kaj li

volis rigardadi sin tuttage. Sed la Doktoro diris ke li bezonas ĝin por sin razi.

Tiam la Princo, preninte aron da kupraj ŝlosiloj el poŝo, malŝlosis la grandajn duoblajn serurojn. Kaj la Doktoro kun ĉiuj siaj bestoj kuris laŭeble plej rapide al la marbordo; dum Bumpo apogis sin per la muro de la malplena karcero, feliĉe ridetante dum li rigardis ilin foriri, kaj lia granda vizaĝo brilis kvazaŭ polurita eburo en la lunlumo.

Kiam ili atingis la plaĝon ili trovis Polinezion kaj Ĉi-Ĉion atendantaj lin sur la rokoj proksime al la ŝipo.

"Mi bedaŭras pri Bumpo", diris la Doktoro. "Mi timas ke la medikamentaĵo kiun mi uzis tute ne daŭros. Plej verŝajne li estos nigra kiel antaŭe kiam li vekiĝos en la mateno — parto pro tio mi ne volis lasi la spegulon kun li. Tamen, ja *eblas* ke li restos blanka — mi neniam antaŭe uzis tiun miksaĵon. Verdire, mi mem estis surprizita, pro ĝia tioma sukceso. Sed mi devis fari ion, ĉu ne? — Mi ja ne povus broslavadi la kuirejon de la Reĝo dum mia tuta cetera vivo. Tiu kuirejo estis tiom malpura! — Mi povis vidi ĝin tra la

karcerfenestro. Nu, nu! — povra Bumpo!”

“Ho, kompreneble li scios ke ni nur ŝerce trompis lin,” diris la papago.

“Ili tute ne rajtis enŝlosi nin”, diris Dab-Dabo, furioze skuante sian voston. “Ni neniam malbonon faris al ili. Tute bone se li ja renigriĝos! Mi esperas ke li fariĝos nigrega.”

“Sed *li* neniel kulpis pri la afero”, diris la Doktoro. “La Reĝo, lia patro, estis la persono kiu enkarcerigis nin — ne kulpis Bumpo. … Eble mi devus reiri kaj pardonpeti —Ho, nu, mi sendos al li iom da dolĉaĵoj post mia reveno al Puddleby. Kaj kiu scias? — eble li ja restos blanka.”

“La Dormanta Belulino neeviteble rerifuzus lin, eĉ se estus tiel”, diris Dab-Dabo. “Li aspektis pli bone antaŭe, laŭ mia opinio. Sed li neniam estus alia ol malbela, negrave kia estus lia koloro.”

“Tamen, li estis bonkora”, diris la Doktoro — “romantika, kompreneble — sed bonkora. Kaj veras ke ‘beleco dependas de la vidpunkto de la rigardanto.’”

“Mi tute ne kredas ke la povrulo trovis la Dormantan Belulinon”, diris Jipo, la hundo. “Plej

verŝajne li kisis la dikan edzinon de iu kultivisto, kiu dormadis sub pomarbo. Ne mirindus ke ŝi ektimus! Mi demandas al mi kiun li iros kisi ĉifoje. Stulta agado!”

Tiam la puŝumi-tiruvio, la blanka muso, Gub-Gubo, Dab-Dabo, Jipo kaj la strigo Tu-Tuo surŝipen iris kun la Doktoro. Sed Ĉi-Ĉio, Polinezio, kaj la krokodilo restis, ĉar Afriko estis ilia vera hejmo, la lando kie ili naskiĝis.

Kaj kiam la Doktoro staris sur la boato, li rigardis trans la akvon. Kaj li ekmemoris ke neniu estas kun ili kapabla gvidi ilin ree al Puddleby.

La larĝa larĝa maro aspektis ege granda kaj solsentiga en la lunlumo; kaj li komencis demandi al si ĉu ili perdos sian vojon kiam ili ne plu povos vidi la bordon.

Sed eĉ dum li demandadis al si, ili ekaŭdis kuriozan flustrecan bruon, altan en la aero, venantan tra la nokto. Kaj la bestoj ĉiuj ĉesis diri Adiaŭ kaj aŭskultis.

La bruo fariĝis pli laŭta kaj pli granda. Ĝi ŝajnis pliproksimiĝi al ili — sono kia de la aŭtuna vento blovanta tra la folioj de poplo, aŭ granda densa

pluvo batanta tegmenton.

Kaj Jipo, kun sia nazo antaŭen puŝita kaj sia vosto tute rekta, diris:

"Birdoj! — milionoj da ili — rapide flugantaj — jen kio estas!"

Kaj tiam ili ĉiuj rigardis supren. Kaj tie, fluantajn trans la vizaĝon de la luno, kvazaŭ giganta svarmo de malgrandaj formikoj, ili povis vidi milojn kaj milojn da malgrandaj birdoj. Baldaŭ la tuta ĉielo aspektis plena de ili, kaj ankoraŭ pli venis — pli kaj pli. Estis tiom da ili ke dum nelonga tempo ili kovris la tutan lunon tiel ke ĝi ne povis brili, kaj la maro fariĝis senluma kaj nigra — kiel kiam ŝtormonubo transiras la sunon.

Kaj baldaŭ ĉiuj tiuj birdoj malsupren venis proksimen, transflugante la akvon kaj la teron; kaj la nokta ĉielo restis supre klara, kaj la luno brilis kiel antaŭe. Tamen nek vokon nek krion nek kanton ili faris — neniun sonon, escepte de tiu granda bruado de plumoj kiu pligrandiĝadis nun pli ol antaŭe. Kiam ili komencis sidiĝi sur la sablo, laŭlonge de la ŝnuroj de la ŝipo — ĉie escepte de la arboj — la Doktoro povis vidi ke ili havas bluajn

flugilojn kaj blankajn brustojn kaj tre mallongajn plumkovritajn krurojn. Tuj kiam ili ĉiuj trovis sidlokon, subite, tute ne okazis ia ajn bruo — estis tute trankvile, tute silente.

Kaj en la silenta lunlumo Johano Dolittle parolis:

"Mi tute ne konceptis ke ni estis tiom longe en



"Amare plorante kaj signante adiaŭon ĝis la ŝipo ne plu estis videbla.


Afriko. Estos preskaŭ Somero kiam ni revenos hejmen. Ĉar jen la hirundoj reirantaj. Hirundoj, mi dankas vin ĉar vi atendis nin. Vi vere estas tre afablaj. Nun ni ne bezonos timi perdi nian vojon sur la maro. … Tiru la ankron kaj levu la velon!"

Kiam la ŝipo moviĝis sur la akvon, la restintoj,

Ĉi-Ĉio, Polinezio, kaj la krokodilo fariĝis malfeliĉegaj. Ĉar neniam en siaj vivoj ili konis ulon kiun ili tiom amis kiom Doktoron Johanon Dolittle el Puddleby-sur-la-Marĉo.

Kaj vokinte "Adiaŭ" al ili ripete, ili ankoraŭ restis tie sur la rokoj, amare plorante kaj signante adiaŭon ĝis la ŝipo ne plu estis videbla.

## 13. RUĜAJ VELOJ KAJ BLUAJ FLUGILOJ



SEN eblo ĉirkaŭiri, la ŝipo de la Doktoro devis pasi la bordon de Barbario. Tiu bordo estas la marbordo de la Granda Dezerto. Ĝi estas sovaĝa solsentiga loko — nur sablo kaj ŝtonoj. Kaj tie loĝis la piratoj de Barbario.

Tiuj piratoj, malbona aro da viroj, kutimis atendi la averion de maristoj sur ilia bordo. Kaj ofte, se ili vidis pasantan boaton, ili elvenis en siaj rapide velantaj ŝipoj kaj ĉasis ĝin. Kaptinte tiel boaton sur la maro, ili ŝtelis ĉion en ĝi; kaj forpreninte ĉiujn homojn de la boato, ili sinkigis ĝin kaj revelis al Barbario kantante kaj fierante pro siaj misagoj. Post tio ili devigis la kaptitojn skribi leterojn al siaj amikoj petante monon. Kaj se la amikoj ne sendis monon, ofte la piratoj ĵetis la homojn en la maron.

Nu, unu sunbrilan tagon la Doktoro kaj Dab-Dabo estis promenantaj sur la ŝipo por ekzerciĝi;

agrabla freŝa vento antaŭenblovadis la boaton, kaj ĉiuj estis feliĉaj. Baldaŭ Dab-Dabo vidis la velon de alia ŝipo tre malproksima malantaŭ ili sur la rando de la maro. Ĝi estis ruĝa velo.

“Mi havas malbonan senton pri tiu velo”, diris Dab-Dabo. “Mi sentas ke ĝi ne estas amika ŝipo. Mi timas ke pli da problemegoj venas al ni”.

Jipo, kiu tiam kuŝis apude dormante en la sunbrilo, komencis grumbli kaj paroli dum li dormis.

“Mi flaras rostatan bovaĵon”, li murmuris — malsufiĉe rostitan bovaĵon — kun bruna saŭco sur si”,

“Jadi!” kriis la Doktoro. “Kio ĝenas la hundon? Ĉu li flaras *flaras* dum li dormas — krom paroli?”

“Mi supozas ke jes”, diris Dab-Dabo. “Ĉiuj hundoj povas flari dum ili dormas”.

“Sed kion li flaras?” demandis la Doktoro. “Ne estas rostata bovaĵo en nia ŝipo”.

“Prave”, diris Dab-Dabo. “La rostata bovaĵo sendube estas en tiu alia ŝipo tie.”

“Sed tiu ŝipo estas dek kvin kilometrojn for”, diris la Doktoro. “Certe li ne povus flari ion tiom

distancan!”

“Ho jes ja, li povas”, diris Dab-Dabo. “Demandu al li.”

Tiam Jipo, ankoraŭ plene dormanta, rekomencis minace grumbli kaj lia lipo kurbiĝis kolere, tiel ke liaj puraj blankaj dentoj vidiĝis.

“Mi flaras fiulojn”, li grumblis — “la plej fiajn homojn kiujn iam mi flaris. Mi flaras misegojn. mi flaras bataladon — ses fiulojn kontraŭ unu bravulo. Mi volas helpi lin. Boj’ — oojj — BOJ!” Tiam li bojis laŭte kaj vekis sin kun surprizo sur la vizaĝo.


“Vidu!” kriis Dab-Dabo. “Tiu boato estas pli proksima nun. Eblas kalkuli ĝiajn tri velojn — ĉiuj estas ruĝaj. Negrave kiuj estas, ili postkuras nin. … Kiuj ili povas esti?”

“Ili estas fimaristoj”, diris Jipo; “kaj ilia ŝipo estas tre rapida. Ili nepre estas la piratoj de Barbario.”*

“Nu, ni devas levi pli da veloj sur nia ŝipo”, diris la Doktoro, “tiel ke ni velos pli rapide kaj sukcesos fuĝi de ili. Malsuprenkuru, Jipo, kaj portu al mi ĉiujn velojn kiujn vi vidos.”

La hundo rapidis malsupren kaj suprentrenis ĉiun velon kiun li povis trovi.

Sed eĉ post ĉiuj veloj estis levitaj sur la masto por kapti la venton, la boato ne iris eĉ proksimume tiel rapide kiel la ŝipo de la piratoj — kiu plu sekvis ilin, ĉiam pli proksime.



“Ili nepre estas la piratoj de Barbario.”

“Ĉi tiu ŝipo donita al ni de la Princo estas maltaŭga ŝipo”, diris Gub-Gubo la porko — “la plej malrapida kiun li povis trovi, mi konjektas. Egale bone peni venki en konkurso per supkaldrono kiel fuĝi de ili en ĉi olda boataĉo. Vidu kiom proksimaj ili estas nun — eblas vidi la lipharojn sur la vizaĝoj de la viro — seso da ili.

Kion ni faru?”

Tiam la Doktoro petis Dab-Dabon suprenflugi kaj diri al la hirundoj ke piratoj sekvas en rapida ŝipo, kaj kion li faru pri tio?

Kiam la hirundoj aŭdis tion, ili ĉiuj malsupreniris al la ŝipo de la Doktoro; kaj ili diris ke li malimpliku la fadenojn de pecoj de longaj ŝnuroj kaj faru el ili multajn maldikajn ŝnurojn kiel eble plej rapide. Post tio la finaĵoj de tiuj ŝnuroj estis ligitaj al la antaŭo de la ŝipo; kaj la hirundoj prenis la ŝnurojn per siaj piedoj kaj forflugis, tirante la ŝipon.

Kaj kvankam hirundoj ne estas tre fortaj kiam temas pri nur unu aŭ du, estas tre malsimile kiam estas multe da ili kune. Kaj tie, ligita al la ŝipo de la Doktoro, estis mil ŝnuroj; kaj dumil hirundoj tiris ĉiun ŝnuron — kaj ili ĉiuj estas tre rapidaj flugpovantoj.

Kaj post momento la Doktoro trovis sin veturanta tiom rapide ke li devis teni sian ĉapelon per ambaŭ manoj; ĉar li sentis kvazaŭ la ŝipo mem flugas tra ondoj kiuj ŝaŭmas kaj bolis pro rapido.

Kaj ĉiuj bestoj sur a ŝipo komencis ridi kaj

danci en la bloviĝanta aero, ĉar kiam ili retrorigardis al la ŝipo de la piratoj, ili povis vidi ĝin fariĝi nun malpli granda, anstataŭ pli granda. La ruĝaj veloj estis lasataj tre tre malantaŭe.

## 14. AVERTO DE LA RATOJ

DUM la hirundoj tiradis la ŝipon tra la maro ili trovis ke tio estas tre malfacila laboro. Kaj post du aŭ tri horoj iliaj flugiloj komencis laciĝi. Tiam ili sendis mesaĝon al la Doktoro por diri ke ili baldaŭ devos iom ripozi; kaj ke ili tiros la boaton al insulo ne tre malproksima, kaj kaŝos ĝin en profunda golfo ĝis ilia spirkapablo refortiĝos sufiĉe por pli tiradi.

Kaj baldaŭ la Doktoro vidis la insulon kiun ili menciis. Ĝi havis tre belan altan monton en sia centro.

Kiam la ŝipo estis velinta sekure en la golfon tiel ke ĝi ne estas videbla elde la ĝenerala maro, la Doktoro diris ke li eliros sur la insulon por serĉi akvon — ĉar restis neniom por trinki en lia ŝipo. Kaj li diris al ĉiuj siaj bestoj ke ankaŭ ili eliru kaj kure ludu sur la herbo por reĝustigi siajn krurojn.

Nu, dum ili eliradis, la Doktoro rimarkis ke

granda nombro da ratoj supreniras en la ŝipo kaj ankaŭ foriras el la ŝipo. Jipo komencis postkuri ilin, ĉar ĉasi ratojn de ĉiam estis lia plej amata ludo. Sed la Doktoro ordonis ke li ĉesigu tion.

Kaj unu granda nigra rato, kiu evidente volis diri ion al la Doktoro, nun rampis antaŭen timide laŭ la manapogilo, rigardante la hundo per angulo de sia okulo. Kaj tusinte nervoze du- tri-foje, kaj puriginte siajn lipharojn kaj viŝinte sian buŝon, li diris:

"He — e-, a-, vi scias kompreneble ke estas ratoj en ĉiuj ŝipoj, Doktoro, ĉu ne?"


Kaj la Doktoro diris, "Jes".

"Kaj vi aŭdis ke ratoj ĉiam foriras el sinkanta ŝipo?"

"Jes", diris la Doktoro — "Tion oni diras".

"Oni", diris la rato, "ĉiam diras ĝin rikane — kvazaŭ temas pri io riproĉinda. Sed ni ne estas riproĉindaj, ĉu? Ja vere, kiu *volus* resti en sinkanta ŝipo, se eble foriri el ĝi?"

"Estas tre nature", diris la Doktoro — "tre nature. Mi plene komprenas. … Ĉu ion alian vi volis diri?"



"Kaj vi aŭdis ke ratoj ĉiam foriras el sinkanta ŝipo?"

“Jes”, diris la rato. “Mi venis informi vin ke ni foriras el ĉi tiu. Sed ni volis antaŭe averti vin. Ĉi tiu ŝipo via estas malbona. Ĝi ne estas sekura. La flankoj ne estas sufiĉe fortikaj. Ĝiaj traboj estas putraj. Antaŭ la nokto morgaŭ ĝi sinkos al la fundo de la maro”.

“Sed kiel vi scias?” demandis la Doktoro.

“Ni ĉiam scias”, respondis la rato. “La pintoj de niaj vostoj eksentas piketadon — simile al kiam onia piedo dormas. Ĉimatene, je la sesa horo, dum mi matenmanĝis, mia vosto ekhavis pikiĝan senton. Unue mi supozis ke revenas mia reŭmatismo. Do mi iris demandi al mia onklino kion ŝi sentas — ĉu vi memoras ŝin? — la longan pigan raton, iom maldikan, la pasintan printempon, kun iktaro? Nu — kaj ŝi diris ke *ŝia* vosto sentas pikegiĝon! Tiam ni sciis tutcerte, ke ĉi boato sinkos antaŭ malpli ol du tagoj; kaj ni ĉiuj decidiĝis foriri el ĝi tuj kiam ni estos sufiĉe proksimaj al tero. Ĝi estas malbona ŝipo, Doktoro. Ne plu velu en ĝi, alie vi certe dronos. … Adiaŭ! Ni nun iras serĉi bonan loĝlokon sur ĉi tiu insulo”.

“Adiaŭ!” diris la Doktoro. “Kaj grandan dankon

ke vi venis informi min. Vi estas tre komplezema — multe! Salutu vian onklinon en mia nomo. Mi perfekte memoras ŝin. … Delasu tiun raton, Jipo! Venu ĉi tien! Kuŝiĝu!”

Do tiam la Doktoro kaj ĉiuj liaj bestoj eliris, portante sitelojn kaj kuirpotojn, por serĉi akvon sur la insulo, dum la hirundoj ripozis.

“Mi scivolas kiel ĉi tiu insulo nomiĝas”, diris la Doktoro, dum li grimpadis la montoflankon. Ĝi aspektas tre plaĉa. Kiom da birdoj estas ĉi tie!”

“Ho, ĉi tiuj estas la Kanariaj Insuloj”, diris Dab-Dabo. “Ĉu vi ne aŭdas la kanariojn kanti?”

La Doktoro haltis kaj aŭskultis.

“Nu, jes ja — kompreneble!” li diris. “Vere mi estas stulta! Eble ili povas informi al ni kie trovi akvon”.

Kaj baldaŭ la kanarioj, kiuj jam plene informiĝis pri Doktoro Dolittle de migrantaj birdoj, venis kaj gvidis lin al bela fonto de malvarma klara akvo, kie la kanarioj kutimis bani sin; kaj ili montris al li belajn kampojn kie kreskas la birdosemoj, kaj ĉiujn aliajn vidindaĵojn de la insulo.

Kaj la puŝumi-tiruvio ĝojis pro ilia alveno; ĉar al li multe pli plaĉis la verda herbo ol la sekigitaj pomoj kiujn li manĝadis en la ŝipo. Kaj Gub-Gubo blekis ĝoje kiam li trovis tutan valon plena de sovaĝaj sukerkanoj.

Post iom da tempo, kiam ili ĉiuj estis ĝissate manĝintaj kaj trinkaj, kaj kuŝadis surdorse dum la kanarioj kantadis por ili, du hirundoj venis haste, tre konfuzite kaj ekscitite.

“Doktoro!” ili kriis, “la piratoj venis en la golfon, kaj ili ĉiuj suriris vian ŝipon. Ili estas malsupre en ĝi, serĉante ŝtelindaĵojn. Ili lasis sian propran ŝipon senhoma. Se vi rapide venos al la bordo, vi povos eniri ilian ŝipon — kiu estas tiom rapida — kaj eskapi. Sed vi devos hasti”.

“Jen bona ideo”, diris la Doktoro — “bonega!”

Kaj li kunvokis ĉiujn siajn bestojn, adiaŭis la kanariojn, kaj malsupren kuris al la plaĝo.

Atinginte la bordon ili vidis la piratŝipon, kun la tri ruĝaj veloj, senmova en la akvo; kaj — ĝuste kiel diris la hirundoj — neniu estis en ĝi; la piratoj ĉiuj estis en la interno de la ŝipo de la Doktoro, serĉante ŝtelindaĵojn.

## 15. LA DRAKO DE BARBARIO

EVENTUALE ĉio estus ĝusta, se la porko ne estus malvarmumiĝinta dum li manĝis la malsekan sukerkanojn sur la insulo. Jen kio efektive okazis:

Tute silente post kiam ili levis la ankron, kaj dum ili movis la ŝipon tre tre zorge en la golfon, Gub-Gubo eksternis tiom laŭte ke la piratoj en la alia ŝipo kuris supren por vidi kio kaŭzis la bruon.

Tuj kiam ili vidis ke la Doktoro eskapas, ili veligis la alian boaton tiel ke ĝi estis rekte trans la enirejo de la golfo tiel ke la Doktoro ne povis eliri al la libera maro.

Tiam la estro de tiuj fiuloj (kiu nomis sin "Ben Ali, la Drako") skuis sian pugnon kontraŭ la Doktoro kaj kriis trans la akvon:

"Ha! Ha! Vi kaptiĝis, mia bela amiko! Vi intencis forkuri per mia ŝipo, ĉu? Sed vi ne estas sufiĉe bona maristo por venki Ben-Alion, la

Barbarian Drakon. Mi volas tiun anason vian — kaj ankaŭ la porkon. Ni manĝos porkokotletojn kaj rostitan anason ĉinokte. Kaj antaŭ ol mi lasos vin hejmeniri, vi devos devigi viajn amikojn sendi al mi kofron da oro".

Povra Gub-Gubo komencis plori; kaj Dab-Dabo pretigis sin flugi por savi sian vivon. Sed la strigo, Tu-Tuo, flustris al la Doktoro. "Pluparoligadu lin, Doktoro. Afablu al li. Nia olda ŝipo nepre baldaŭ sinkos — la ratoj diris ke ĝi estos ĉe la fundo de la maro antaŭ la nokto morgaŭ — kaj la ratoj neniam eraras. Estu afabla, ĝis la ŝipo sinkos sub li. Pluparoligadu lin".


"Kion? Ĝis la nokto morgaŭ!" diris la Doktoro. "Nu, mi penos. … Mi pensu — pri kio mi parolu?"

"Ho, lasu ilin veni", diris Jipo. "Mi povos kontraŭbatali la fiajn friponojn. Ili estas nur ses. Ili venu. Volonte mi diros al tiu najbara ŝafhundo, post nia reveno hejmen, ke mi mortis aŭtentikan piraton. Ili venu. Ni povos kontraŭbatali ilin."

"Sed ili havas pistolojn kaj glavojn", diris la Doktoro. "Ne, tio tute ne fareblus. Mi devos paroladi al li. … Atentu, Ben Ali — "

Sed antaŭ ol la Doktoro povis diri plion, la piratoj komencis veligi la ŝipon pli proksimen, gaje ridante, kaj dirante inter si, “Kiu la unua kaptos la porkon?”

Povra Gub-Gubo ektimegis; kaj la puŝumi-



“Atentu, Ben Ali”

tiruvio komencis akrigi siajn kornojn por batalo, frotante ilin per la masto de la ŝipo; dum Jipo daŭre saltis alten kaj bojadis kaj fiinsultadis Ben-Alion per la hundolingvo.

Sed baldaŭ io ŝajnis embarasi la piratojn: ili ĉesis ridi kaj ŝercadi, ili ekaspektis konfuzitaj; kaj

io maltrankviligis ilin.

Tiam Ben Ali, gapante al siaj piedoj, subite elkriegis:

"Tondro kaj Fulmo! — "Viroj, *la boato likas!*"

Kaj tiam la aliaj piratoj rigardis trans la flankon de la boato kaj vidis ke la boato efektive pli kaj pli mergiĝas en la akvo. Kaj unu el ili diris al Ben Ali:

"Sed certe se ĉi olda boato sinkus ni vidus la ratojn foriri el ĝi".

Kaj Jipo transkriis el la alia ŝipo: "Stultuloj, ne restas ratoj tie por foriri! Ili foriris jam antaŭ du horoj! 'Ha, ha,' al vi, 'miaj belaj amikoj!'"

Sed kompreneble la viroj ne komprenis lin.

Baldaŭ la antaŭa finaĵo de la ŝipo komencis subiri konstante pli rapide — ĝis la boato aspektis preskaŭ kiel staranta sur sia kapo; kaj la piratoj devis kroĉiĝi al la manapogiloj kaj la mastoj kaj la ŝnuroj kaj ĉio alia por eviti gliti de la boato. Tiam la maro ekfluis bruege tra ĉiujn fenestrojn kaj pordojn. Kaj fine la ŝipo plonĝis rekte al la fundo de la maro, farante teruran gluglan sonon; kaj la ses fiuloj restis balanciĝante en la profunda akvo de la golfo.

Kelkaj el ili komencis naĝi al la bordo de la insulo, dum aliaj venis kaj klopodis suriri la ŝipon kie estas la Doktoro. Sed Jipo daŭre minace mordis cele iliajn nazojn, tiel ke ili timis grimpi la flankon de la ŝipo.

Tiam subite ili ĉiuj elkriegis panikite:

"*La ŝarkoj!* La ŝarkoj venas! Ni suriru la ŝipon antaŭ ol ili manĝos nin! Helpu, helpu! — la ŝarkoj! la ŝarkoj!"

Kaj nun la Doktoro povis vidi, sur la tuta golfo la dorsojn de grandaj fiŝoj naĝantaj rapide tre la akvo.

Kaj unu granda ŝarko proksimiĝis al la ŝipo, kaj puŝinte sian nazon el la akvo li diris al la Doktoro:

"Ĉu vi estas Johano Dolittle, la fama kuracisto por bestoj?"

"Jes", diris Doktoro Dolittle, "tiel mi nomiĝas".

"Nu", diris la ŝarko, "ni scias ke ĉi tiuj piratoj estas fiuloj — precipe Ben Ali. Se ili ĝenas vin, ni volonte elmanĝos ilin por vi — tiam ili ne plu ĝenos vin".

"Dankon", diris la Doktoro. "Tio estas vere tre kompleza. Sed mi kredas ke ne necesos manĝi

ilin. Malebligu ke iu el ili atingos la bordon, ĝis mi informos vin — simple devigu ilin plu naĝadi, bonvolu. Kaj bonvolu devigi Ben-Alion naĝi ĉi tien por ke mi parolu kun li".

Do la ŝarko foriris kaj ĉasis Ben-Alion al la Doktoro.

"Aŭskultu, Ben Ali", diris Johano Dolittle, klinante sin trans la flankon de la ŝipo. "Vi estas tre fia homo; kaj mi scias ke vi mortigis multajn personojn. Ĉi tiuj komplezemaj ŝarkoj ĉi tie ĵus proponis al mi ke ili manĝu vin por mi — kaj ja vere estus bone se la maroj ne plu havus vin. Sed se vi promesos fari kion mi ordonos, mi permesos ke vi estu sekuraj".

"Kion mi devos fari?" demandis la pirato, flanke rigardante la grandan ŝarkon kiu flaradas lian kruron sub la akvo.

"Vi devas ne plu mortigi homojn", diris la Doktoro; "vi devos ĉesi ŝteladi; vi devas neniam denove sinkigi ŝipon; vi devas tute rezigni pri piratado".

"Sed do kion mi faros?" demandis Ben Ali. "Kiel mi povos vivi?"

“Vi kaj ĉiuj viaj uloj devas suriri ĉi tiun insulon kaj fariĝi kultivistoj de semoj por la birdoj”, respondis la Doktoro. “Vi devos kultivadi birdo-semojn por la kanarioj”

La Drako de Barbario paliĝis pro kolero. “*Kultivadi birdosemojn!*” li ĝemis malaprobege. “Ĉu mi ne povos esti maristo?”

“Ne”, diris la Doktoro, “vi ne povos. Vi jam de sufiĉe longe estas maristo — kaj sendis multajn bonajn ŝipojn kaj bonajn homojn al la fundo de la maro. Dum via tuta cetera vivo vi devos esti pacamanta kultivisto. La ŝarko atendas. Ne malŝparu pli da lia tempo. Decidiĝu”.

“Tondro kaj Fulmo!” Ben Ali murmuris — “*Birdosemoj!*” Post tio li rerigardis en la akvon kaj vidis la grandan fiŝon flaranta lian alian kruron.

“Mi akceptas”, li diris malĝoje. “Ni kultivados.”

“Kaj memoru”, diris la Doktoro, “ke se vi ne plenumos vian promeson — se vi rekomencos mortigi kaj ŝteli, mi informiĝos pri tio, ĉar la kanarioj venos informi min. Kaj vi povas esti tute certa ke mi trovos metodon puni vin. Ĉar kvankam mi ne povas veligi ŝipon tiom bone kiom

vi, dum la birdoj kaj la bestoj kaj la fiŝoj restos miaj amikoj, mi ne bezonos timi piratoĉefon — eĉ kvankam li nomas sin 'La Drako de Barbario'. Nun iru esti bona kultivisto kaj vivu pace".

Kaj la Doktoro turnis sin al la granda ŝarko, kaj skuante sian manon li diris:

"Bone. Lasu ilin naĝi sekure al la tero".

# 16. TU-TUO, LA AŬSKULTANTO



HEJMENCELIS denove la Doktoro kaj liaj dorlotbestoj, en la rapida ŝipo kun la tri ruĝaj veloj, post nova danko al la ŝarkoj pro ilia komplezemo.

Dum ili moviĝis en la liberan maron, la bestoj ĉiuj malsupreniris por vidi kia estas ilia nova boato interne; dum la Doktoro apogis sin per la manapogilo ĉe la malantaŭo de la ŝipo, kun pipo en sia buŝo, rigardante la Kanariajn Insulojn forfadi en la blua vesperokrepusko.

Dum li staris tie, pripensante kiel statas la simioj — kaj kia aspektos lia ĝardeno kiam li revenos al Puddleby, Dab-Dabo rapidis supren laŭ la ŝtuparo, ridetante kaj parolemega.

"Doktoro!" ŝi kriis. "Ĉi tiu ŝipo de la piratoj estas vere belega — tute nekredeble. La litoj malsupre konsistas el primolkolora silko — kun centoj da grandaj kapkusenoj kaj kusenegoj; estas

densaj molaj tapiŝoj sur la plankoj; la teleroj estas el arĝento, kaj estas ĉiaj bonaĵoj por manĝi kaj trinki — specialaĵoj — la manĝoŝranko — nu ĝi estas kvazaŭ butiko, tute vere. Vi neniam vidis ion tian dum via tuta vivo. Kredu min — ili havis kvin specojn de sardinoj, tiuj viroj! Venu rigardi. … Ho, kaj ni trovis malgrandan ĉambron tie malsupre, kies pordo estas ŝlosita; kaj ni ĉiuj ekscitoplene volas eniri kaj vidi kio estas en ĝi. Jipo diras ke sendube tie la piratoj tenis sian trezoron. Sed ni ne povas malfermi la pordon. Venu kaj provu enlasi nin".

Do la Doktoro malsupreniris kaj li vidis ke tutvere la ŝipo estas bela. Li trovis ĉiujn siajn bestojn grupiĝintaj ĉe malgranda pordo, ĉiuj samtempe parolis, penante diveni kio estas en la ĉambro. La doktoro turnis la anson sed ĝi ne estis malfermebla. Tiam ili ĉiuj komencis serĉi la ŝlosilon. Ili serĉis sub la mato, ili serĉis sub ĉiuj tapiŝoj, ili serĉis en ĉiuj ŝrankoj kaj vestejoj — en la grandaj ŝrankoj en la manĝoĉambro de la ŝipo; ili serĉis ĉie.

Farante tion ili trovis multajn novajn

mirindaĵojn sendube ŝtelitajn de la piratoj el aliaj ŝipoj — kaŝmirajn ŝalojn maldikajn kiel aranefadenoj, broditajn je oraj floroj; potojn plenajn de altakvalita tabako el Jamajko; tajlitajn eburajn kestojn plenajn de rusa teo; malnovan violonon kun rompita kordo kaj bildo sur sia dorso; kompleton de grandaj ŝakfiguroj, tajlitaj el koralo kaj sukceno; marŝbastonon kiu interne havis glavon, kiu elŝoviĝis kiam oni tiris la anson; ses vinoglasojn kun turkizo kaj arĝento ĉirkaŭ la randoj; kaj belan grandan sukerpoton, el perlamoto. Sed nenie en la tuta ŝipo ili povis trovi ŝlosilon por tiu seruro.

Do ili ĉiuj revenis al la pordo, kaj Jipo provis rigardi tra la serurotruon. Sed io estis starigita antaŭ la pordo ĉe la alia flanko kaj li povis vidi nenion.

Dum ili staris necertaj pri kion fari, la strigo, Tu-Tuo, ekdiris:

“Ĉit! — Aŭskultu! — Mi ja kredas ke iu estas en la ĉambro!”


Ili ĉiuj silentis dum momento. Post tio la Doktoro diris:

"Certe vi eraras, Tu-Tuo. Mi aŭdas nenion".

"Mi certas", diris la strigo. "Ĉit — jen ĝi denove — ĉu vi ne aŭdas tion?

"Ne, mi ne aŭdas", diris la Doktoro. "Kia bruo ĝi estas?"

"Mi aŭdas la bruon de persono kiu metas sian



"Ĉit! — Aŭskultu! — Mi ja kredas ke iu estas en la ĉambro!"

manon en sian poŝon", diris la strigo.

"Sed tio faras preskaŭ nenian sonon", diris la Doktoro. "Vi ne povus aŭdi tion ĉi tie".

"Pardonu, sed mi ja povas", diris Tu-Tuo. "Mi diras al vi ke estas iu aliflanke de tiu pordo, kiu metas sian manon en sian poŝon. Preskaŭ ĉio

faras *ian* bruon — se nur viaj oreloj estas sufiĉe akutaj por kapti ĝin. Vespertoj povas aŭdi talpon marŝantan en sia tunelo sub la tero — kaj ili opinias sin bonaj aŭskultantoj. Sed ni strigoj povas informi vin, uzante nur unu orelon, la koloron de katido laŭ la maniero de ĝiaj palpebrumoj en la mallumo".

"Nu, nu!" diris la Doktoro. "Vi surprizas min. Tio estas tre interesa. … Denove aŭskultu kaj diru al mi kion li faras nun".

"Mi ankoraŭ ne certas", diris Tu-Tuo, "se efektive ja estas viro. Povus esti virino. Levu min por ke mi aŭskultu ĉe la serurotruo kaj mi baldaŭ povos informi vin".

Do la Doktoro levis la strigon kaj tenis lin proksime al la seruro de la pordo.

Post momento Tu-Tuo diris:

"Nun li frotas sian vizaĝon per sia maldekstra mano. Ĝi estas malgranda mano kaj malgranda vizaĝo. *Eble ja* estas virino — ne. Nun li puŝas sian hararon for de sia frunto — nepre estas viro".

"Virinoj kelkafoje faras tion", diris la Doktoro.

"Vi pravas", diris la strigo. "Sed kiam ili faras

tion, ilia longa hararo faras tute alian sonon. … Ĉit! Silentigu tiun malkvietan porkon. Nun ĉiuj retenu la spiron dum momento por ke mi povu bone aŭskulti. Estas tre malfacila, kion mi faras nun — kaj tiu pordaĉo estas dikega! Ĉit! Ĉiuj tute silentu — fermu viajn okulojn kaj ne spiru".

Tu-Tuo klinis sin kaj denove aŭskultis tre atente kaj tre longe.

Fine li rigardis en la vizaĝon de la Doktoro kaj diris:

"La viro en tiu ĉambro estas malfeliĉa. Li ploras. Li tre zorgas ne fari plorsonon por ke ni ne sciu ke li ploras. Sed mi aŭdis — tute klare — la sonon de larmo kiu falis sur lian manikon".

"Kiel vi scias ke ne estis akvoguto falanta de la plafono sur lin?" demandis Gub-Gubo.

"Pŝa! — kia senscio!" snufis Tu-Tuo. "Akvoguto falanta de la plafono farus dekoble pli da bruo!"

"Nu", diris la Doktoro, "se tiu povrulo malfeliĉas, ni devas eniri kaj trovi kio ĝenas lin. Trovu hakilon por mi, kaj mi trahakos la pordon".

# 17. LA OCEANO-KLAĈANTOJ

REKTE post lia peto, hakilo estis trovita. Kaj la Doktoro baldaŭ hakis truon en la pordon sufiĉe grandan por ke li trapuŝu sin.

Unue li povis vidi tute nenion pro plena mallumo. Do li flamigis alumeton.

La ĉambro estis tre malgranda, sen fenestro, la plafono estis malalta. Kiel meblo estis nur unu malgranda tabureto. Ĉirkaŭ la interno de la ĉambro grandaj bareloj staris apud la muroj, ligitaj ĉe siaj malsuproj por ke ili ne falu pro la ruliĝado de la ŝipo; kaj super la barelo, stanalojaj potoj ĉiadimensiaj pendis de lignaj kejloj. Estis forta vina odoro. Kaj en la centro de la planko sidis malgranda knabo, ĉirkaŭ okjara, amare ploranta.

"Jadi, jen la rumĉambro de la piratoj!" flustris Jipo.

"Jes. Rumegodora!" diris Gub-Gubo. "La odoro kapturnigas min".

La malgranda knabo ŝajnis iom timanta kiam li trovis viron starantan antaŭ li kaj tiom da bestoj gapantaj tra la truo en la rompita pordo. Sed tuj kiam li vidis la vizaĝon de Johano Dolittle per la lumo de la alumeto, li ĉesis plori kaj stariĝis.

"Vi ne estas unu el la piratoj, ĉu?" li demandis.

Kaj kiam la Doktoro malantaŭen puŝis sian kapon kaj ridegis longe kaj laŭte la malgranda knabo ankaŭ ridetis kaj venis kaj prenis lian manon.

"Vi ridas kiel amiko", li diris — "ne kiel pirato. Ĉu vi povas diri al mi kie estas mia onklo?"

"Domaĝe ne", diris la Doktoro. "Kiam vi lasta-foje vidis lin?"

"La tagon antaŭ hieraŭ", diris la knabo. "Mi kaj mia onklo estis fiŝkaptantaj en nia malgranda boato, kiam la piratoj venis kaj kaptis nin. Ili sinkigis nian fiŝkaptan boaton kaj portis nin ambaŭ sur ĉi tiun ŝipon. Ili diris al mia onklo ke ili volas ke li estu pirato simila al ili — ĉar li estis lerta velisto en ĉia vetero. Sed li diris ke li ne volas esti pirato, ĉar mortigi homojn kaj ŝteladi ne estas laboro de bona fiŝkaptisto. Tiam la estro, Ben Ali,

ekfuriozis kaj grincigis siajn dentojn, kaj diris ke ili ĵetos mian onklon en la maron se li ne obeos ilin. Ili malsuprensendis min; kaj mi aŭdis la bruon de batalo super mi. Kaj kiam ili permesis ke mi suprenvenu la sekvan tagon, mia onklo tute ne estis videbla. Mi demandis al la piratoj kie li estas, sed ili rifuzis informi min. Mi multege timas ke ili ĵetis lin en la maron kaj dronigis lin".

Kaj la malgranda knabo rekomencis plori.

"Nu, nu — atendu minuton", diris la Doktoro. "Ne ploru. Ni havu iom da teo en la manĝo-ĉambro, kaj ni diskutos la aferon. Eble via onklo estas tute sekura malgraŭ ĉio. Vi ja ne *scias* ke li estis dronigita, ĉu? Kaj jen tio gravas. Eble ni povos trovi lin por vi. Unue ni iru trinki teon — kun fraga konfitaĵo; kaj poste tio ni decidos kion fari."

Ĉiuj el la bestoj estis starantaj aŭskultante tre scivole. Kaj kiam ili estis irintaj en la manĝo-ĉambron de la ŝipo kaj trinkis teon, Dab-Dabo venis malantaŭ la seĝon de la Doktoro kaj flustris:

"Demandu al la focenoj ĉu la onklo de la knabo dronis — ili scios".

“Bone”, diris la Doktoro, prenante duan pecon de pano-kun-konfitaĵo.

“Kio estas tiuj kuriozaj klakobruoj kiujn vi faras per via lango?” demandis la knabo.

“Ho, mi nur diris kelkajn vortojn en la anaso-lingvo”, la Doktoro respondis. “Jen Dab-Dabo, unu el miaj dorlotbestoj.”

“Mi eĉ ne sciis ke anasoj havas lingvon”, diris la knabo. “Ĉu ĉiuj el tiuj aliaj bestoj ankaŭ estas viaj dorlotbestoj? Kio estas tiu strangaspektaĵo kun du kapoj?”

“Ĉit!” la Doktoro flustris. “Jen la puŝumi-tiruvio. Ne lasu lin vidi ke ni parolas pri li — li tiom ege embarasiĝas. … Diru al mi, kial vi estis enŝlosita en tiun malgrandan ĉambron?”

“La piratoj enfermis min tie kiam ili estis forirontaj ŝteli el alia ŝipo. Kiam mi aŭdis iun hakadi la pordon, mi ne sciis kiu povas esti. Mi multe ĝojis trovante ke estas vi. Ĉu vi kredas ke vi povos trovi mian onklon por mi?”

“Nu, ni multe strebos fari tion”, diris la Doktoro. “Nu: kiel aspektis via onklo?”

“Li havis ruĝan hararon”, la knabo respondis —

"tre ruĝan hararon, kaj la bildon de ankro tatuitan sur sian brakon. Li estis forta viro, amema onklo kaj la plej bona velisto en la Suda Atlantiko. Lia fiŝkapta boato nomiĝis *La impertinenta Sanjo* — kutroriga slupo".

"Kio estas 'kutrorigslupo'?" flustris Gub-Gubo, turninte sin al Jipo.

"Ĉit! — ĝi estas la speco de ŝipo kiun la viro posedis", diris Jipo. " Bonvolu silentadi".

"Ho", diris la porko, "ĉu ĝi estas nur tio? Mi pensis ke ĝi estas ia trinkaĵo".

Do la Doktoro lasis la knabon ludantan kun la bestoj en la manĝoĉambro, kaj supreniris por serĉi pasantajn focenojn.

Kaj baldaŭ tuta grego venis dancante kaj saltante tra la akvo, survoje al Brazilo.

Kiam ili vidis la Doktoron klinanta sin per la manapogilo de sia ŝipo, ili venis enketi kiel li statas.

Kaj la Doktoro demandis al ili ĉu ili vidis viron kun ruĝa hararo kaj ankro tatuita sur sia brako.

"Ĉu vi parolas pri la kapitano de *La impertinenta Sanjo*?" demandis la focenoj.

“Jes”, diris la Doktoro. “Temas pri li. Ĉu li dronis?”

“Lia fiŝista slupo estis sinkigita”, diris la focenoj, ĉar ni vidis ĝin kuŝanta sur la fundo de la maro. Sed neniu estis en ĝi, ĉar ni eniris kaj serĉis”.

“Lia juna nevo estas sur la ŝipo kun mi ĉi tie”, diris la Doktoro. “Kaj li timegas ke la piratoj ĵetis lian onklon en la maron. Ĉu vi bonvolos informiĝi por mi, por ke ni estu certaj, ĉu li jes aŭ ne dronis?”

“Ho, li ne dronis”, diris la focenoj. “Se li dronus, ni nepre aŭdus pri tio de la profundamaraj Dekapodoj. Ni aŭdas pri ĉio okazanta en la profunda akvo. La konkofiŝoj nomas nin ‘La Oceano-Klaĉantoj’. Ne — diru al la knabeto ke ni bedaŭras, sed ni ne scias kie estas lia onklo; sed ni estas tute certaj ke li ne dronis en la maro”.

Do la Doktoro malsupren kuris por informi la nevon, kiu kunfrapis siajn manojn pro ĝojo. Kaj la puŝumi-tiruvio lasis la junan knabon suriri lian dorson kaj rajdi tra la tuta manĝoĉambro; dum la aliaj bestoj ĉiuj sekvis, batante la telerkovrilojn per kuleroj, kvazaŭ paradante.

# 18. Odoroj



“VIA onklo devas nun esti *trovita*”, diris la Doktoro; “jen nia tasko, nun kiam ni scias ke li ne estis ĵetita en la maron.

Nun Dab-Dabo revenis al li, kaj flustris:

“Petu la aglojn serĉi la viron. Neniu vivanto povas vidi pli bone ol aglo. Kiam ili estas kilometrojn super la tero ili povas kalkuli la formikojn rampantajn sur la tero. Petu la aglojn”.

Do la Doktoro sendis hirundon por venigi kelkajn aglojn.

Kaj post ĉirkaŭ horo la malgranda birdo revenis kun ses specoj de agloj: harpioj nigra, kalva, fiŝkapta, ora, vultura; kaj halieta. Ili estis duoble tiom altaj kiel la knabo, ĉiu el ili. Kaj ili staris sur la manapogilo de la ŝipo, kvazaŭ rondaŝultraj soldatoj en vico, severaj senmovaj kaj rigidaj.; dum iliaj grandaj brilantaj nigraj okuloj

sagete rigardis tien kaj tien kaj ĉien.

Gub-Gubo timis ilin kaj kaŝis sin malantaŭ barelo. Li diris ke li sentis kvazaŭ tiuj teruraj okuloj rigardas rekte lian internon por trovi kion li kaŝmanĝis kiel lunĉon.

Kaj la Doktoro diris al la agloj:

“Viro estas perdita — fiŝkaptisto kun ruĝa hararo kaj ankro desegnita sur sia brako. Ĉu vi bonvolos provi trovi lin por ni? Ĉi knabo estas nevo de tiu viro”.

Agloj ne multe parolas. Kaj ilia plena respondo farita per iliaj raŭkaj voĉoj estis:

“Certu ke ni faros nian plejeblon — por Johano Dolittle”.

Post tio ili forflugis — kaj Gub-Gubo venis de malantaŭ sia barelo por rigardi ilian foriron. Pli kaj pli kaj pli supren ili iris — alten, pli alten, kaj eĉ pli alten. Tiam, kiam la Doktoro apenaŭ povis plu vidi ilin, ili disiris kaj komencis flugi diversdirekte — norde, oriente, sude kaj okcidente — aspektante kvazaŭ grajneroj de nigra sablo rampantaj trans la larĝan bluan ĉielon.

“Jadi!” diris Gub-Gubo per solena voĉo, “Kia

alto! Mirigas min ke ili ne bruligas siajn flugilojn — tiom proksime al la suno!”

Ili longe forestis. Kaj kiam ili revenis estis preskaŭ nokto.

Kaj la agloj diris al la Doktoro:

“Ni traserĉis ĉiujn marojn kaj ĉiujn landojn kaj ĉiujn insulojn kaj ĉiujn urbojn kaj ĉiujn urbetojn en ĉi tiu duono de la mondo. Sed senrezulte. En la ĉefa strato de Ĝibraltaro ni vidis tri ruĝajn harojn kuŝantajn en puŝĉaro antaŭ la pordo de bakisto. Sed ili ne estis la haroj de horo — ili estis haroj el pelta mantelo. Nenie, sur la tero nek sur la akvo, ni povis vidi ian spuron de la onklo de ĉi tiu knabo. Kaj se *ni* ne povis vidi ilin, do li ne estas videbla. … Ĉar, Johano Dolittle, ni faris ĉion eblan.”

Tiam la ses grandaj birdoj klakis per siaj grandaj flugiloj kaj forflugis ree al siaj hejmoj en la montoj kaj la rokoj.

“Nu”, diris Dab-Dabo, post ilia foriro, “kion ni faru nun? La onklo de la knabo estas *trovenda* — ne povas esti disputo pri tio. La knabo ne estas sufiĉe aĝa por vivi sola en la mondo. Knaboj ne

estas kiaj anasidoj — necesas prizorgi ilin ĝis ili tre aĝiĝas. ... Se nur Ĉi-Ĉio estus ĉi tie! Li baldaŭ trovus la oldulon. Bona kara Ĉi-Ĉio! Volonte mi scius kiel li statas nun!"

"Se nur ni havus Polinezion kun ni", diris la blanka muso. "*Ŝi* baldaŭ elpensus rimedon. Ĉu vi memoras kiel ŝi liberigis nin el la karcero — la duan fojon? Ho, ja ŝi estis lerta!"

"Mi ne tiom admiras tiujn aglulojn", diris Jipo. "Ili estas nur orgojlaj. Ili havas tre bonan vidpovon, jes ja; sed kiam oni petas ilin trovi homon por vi, ili ne povas — kaj ili aŭdacas reveni kaj diri ke neniu alia povus sukcesi. Ili estas nur plenaj de orgojlo — same kiel tiu ŝafhundo en Puddleby. Kaj mi ankaŭ ne alte taksas tiujn klaĉemajn oldajn focenojn. Ili nur povis diri al ni ke la viro ne estas en la maro. Ni ne volas scii kie li *ne* estas — ni volas scii kie li *ja* estas".

"Ho, ne parolu tiom", diris Gub-Gubo. "Facilas paroli; sed ne tiom facilas trovi viron kiam vi devas trovi lin ie ajn en la tuta mondo. Eble la hararo de la fiŝisto blankiĝis, pro maltrankvileco pri la knabo; kaj tial la agloj ne trovis lin. Vi ne

scias ĉion. Vi nur parolas. Ankaŭ vi ne povus trovi la onklon de la knabo, same kiel la agloj — vi ne povus serĉi egale bone".

"Ĉu?" diris la hundo. Tiom kredas scii vi, ĉu, vi kiu estas stulta peco de varma lardo! Mi eĉ ne komencis provi, ĉu ne? Atentu kaj vi vidos".



"Vi kiu estas stulta peco de varma lardo!"

Tiam Jipo iris al la Doktoro kaj diris: "Bonvolu demandi al la knabo ĉu li havas ian posedaĵon de lia onklo en siaj poŝoj."

Do la Doktoro demandis al li. Kaj la knabo montris al ili oran ringon kiun li tenis per peco de ŝnuro ĉirkaŭ sia kolo ĉar ĝi estis tro granda por lia fingro. Li diris ke lia onklo donis ĝin al li kiam ili vidis la piratojn veni.

Jipo flaris la ringon kaj diris:

"Tio ne utilas. Demandu al li ĉu li havas iun alian posedaĵon de sia onklo".

Tiam la knabo prenis el sia poŝo grandegan ruĝan naztukon kaj diris, "Ankaŭ ĉi tio apartenis al mia onklo".

"*Flartabako*, je Dio! — nigra raspita flartabako. Ĉu vi ne flaras ĝin? Lia onklo uzis flartabakon — demandu al li, Doktoro".

La Doktoro denove demandis la knabon; kaj li diris, "Jes, mia onklo uzis multe da flartabako".

"Bonege!" diris Jipo. "La viro estas do preskaŭ trovita. Estos egale facile lin trovi, kiel ŝteli lakton de katido. Diru al la knabo ke mi trovos lian onklon por li en malpli ol semajno. Ni supreniru kaj trovu kiudirekte ĉi tiu vento blovas".

"Sed nun estas mallume", diris la Doktoro. "Vi ne povos trovi lin en la mallumo".

"Mi neniel bezonas lumon por serĉi viron kiu odoras pro nigra raspita flartabako", diris Jipo, dum li grimpis la ŝtuparon. "Se la odoro de la viro estus malfacila, kia de ŝnuro, aŭ de varma akvo, estus malsimile. Sed *flartabako!* — ta ta ta!"

“Ĉu varma akvo odoras?” demandis la Doktoro.

“Certe”, diris Jipo. “La odoro de varma akvo estas tute malsimila al tiu de malvarma akvo. Varmega akvo — aŭ glacio — havas vere malfacile flareblan odoron. Nu, foje mi sekvis viron dek kvin kilometrojn dum senluma nokto per la odoro de la varma akvo kiun li uzis por razi sin — ĉar la povrulo ne havis sapon. … Nu, do, ni trovu kiudirekte blovas la vento. Vento estas tre grava por longadistanca flarado. La vento devas ne esti tro feroca — kaj kompreneble ĝi devas blovi ĝustadirekte. Bona, regula, malseketa brizo estas plej bona. … Ha! — ĉi vento venas el la nordo”.

Tiam Jipo iris al la antaŭo de la ŝipo kaj flaris la venton; kaj li komencis murmuri al si:

“Gudro, hispanaj cepoj, kerosena oleo, malsekaj pluvmanteloj, premitaj laŭrofolioj, brulanta kaŭĉuko, puntaj kurtenoj lavataj — ne, mi eraras, puntaj kurtenoj pendigitaj por sekiĝi, kaj vulpoj — centoj da ili — vulpidoj, kaj —“

“Ĉu vi vere povas flari ĉiujn tiujn diversajn aĵojn en ĉi tiu unusola vento?” demandis la

Doktoro.

“Ho, komprenebl!” diris Jipo. “Kaj tiuj estas nur kelkaj el la facilaj odoroj — la fortaj odoroj. Ĉiu hundaĉo povus flari ilin eĉ suferante pro malvarmumo. Atendu, nun, kaj mi diros al vi pri kelkaj el la pli malfacilaj odoroj kiujn portas ĉi tiu vento — kelkaj delikataj.”

Tiam la hundo firme fermis siajn okulojn, puŝis sian nazon rekte supren kaj snufegis kun la buŝo duone malfermita.

Dumlonge li diris nenion. Li restis senmova kiel ŝtono. Li apenaŭ aspektis spiranta. Kiam fine li komencis paroli, la sono estis preskaŭ kvazaŭ li kantas, morne, dum sonĝo.

“Brikoj”, li flustris, tre mallaŭte — “malnovaj flavaj brikoj, disiĝantaj pro oldeco, en muro de ĝardeno; la doĉa spiro de junaj bovinoj starantaj en monta rojo; la plumba tegmento de kolombejo — aŭ eble grenejo — kiun surbrilas la tagmeza suno; nigraj kapridaj gantoj kuŝantaj en tirkesto farita el juglanda ligno; polvokovrita vojo kun porĉevala trinkotrogo sub la platanoj; fungetoj puŝantaj sin tra la putriĝantaj folioj;

kaj — kaj — kaj"

"Ĉu ankaŭ pastinakoj?" demandis Gub-Gubo.

"Ne", diris Jipo. "Vi konstante pensas pri manĝaĵoj. Tute neniuj pastinakoj. Kaj neniu flartabako — multaj pipoj kaj cigaredoj, kaj kelkaj cigaroj. Sed neniu flartabako. Ni devos atendi ĝis la vento fariĝos suda."

"Jes, ne vere utila vento, ĉi tiu", diris Gub-Gubo. "Vi estas ĉarlatano, Jipo. Kiu iam trovis viron en la mezo de la oceano nur per flarado? Mi diris ke vi efektive ne sukcesos".

"Nu atentu", diris Jipo, vere koleriĝante. "Vian nazon trafos mordo post minuto! Ne pensu ke nur ĉar la Doktoro rifuzas permesi ke ni traktu vin kiel vi meritas, ke vi povas esti senfine impertinenta!"

"Ĉesigu la kvereladon!" diris la Doktoro — "ĉesigu! La vivo tro mallongas. Diru al mi, Jipo, el kie, laŭ via kredo, venas tiuj odoroj?"

"El Devono kaj Kimrujo — plejparte", diris Jipo — "la vento venas el tiu direkto".

" Nu, nu!" diris la Doktoro. "Sciu, tio estas vere rimarkinda — vere. Mi devos fari noton pri tio

por mia nova libro. Ĉu vi povus trejni min tiel bone flaradi? … Sed ne — eble estas pli bone ke mi restu kia mi estas. 'Suficô valoras same kiel festeno', oni diras. Ni malsupreniru por manĝi. Mi tre malsatas".

"Ankaŭ mi", diris Gub-Gubo.

# 19. LA ROKO

URĜE la sekvan matenon ili eliris el la silkaj litoj; kaj ili vidis ke la suno forte brilas kaj ke la vento blovas el la sudo.

Jipo flaradis la sudan venton dum horduono. Post tio li venis al la Doktoro, kapneante.

“Ankoraŭ mi ne flaras flartabakon”, li diris. “Ni devos atendi ĝis la vento fariĝos orienta”.

Sed eĉ kiam la orienta vento venis, je la tria horo tiun posttagmezon, la hundo ne povis percepti la odoron de flartabako.

La malgranda knabo ege desapontiĝis kaj rekomencis plori, dirante ke ŝajne neniu povas trovi lian onklon por li. Sed Jipo nur diris al la Doktoro: “Diru al li ke kiam la vento fariĝos okcidenta, mi trovos lian onklon eĉ se li estas en Ĉinujo — kondiĉe ke li plu uzas nigran gratitan flartabakon”.

Tri tagojn ili devis atendi antaŭ ol venis la okcidenta vento. Tio okazis frue vendredon matene — ĝuste je la sunleviĝo. Maldika nebula pluvo kuŝis sur la maro kvazaŭ maldika nubo. Kaj la vento estis milda kaj varma kaj malseka.



“Doktoro!” li kriis. “Mi trovis ĝin!”

Tuj kiam Jipo vekiĝis li kuris supren kaj puŝis sian nazon en la aeron. Tiam li ege ekscitiĝis kaj rerapidis malsupren por veki la Doktoron.

“Doktoro!” li kriis. “Mi trovis ĝin! Doktoro! Doktoro! Vekiĝu! Aŭskultu! Mi trovis ĝin. La vento estas el la okcidento kaj odoras plene de flartabako. Venu supren kaj ekvelu — haste!”

Do la Doktoro levis sin el la lito kaj iris al la rudro por gvidi la ŝipon.

“Nun mi iros al la antaŭo”, diris Jipo; “kaj vi

rigardu mian nazon — kien ajn mi turnos ĝin, turnu la ŝipon simile. La viro ne povas esti tre malproksima — ĉar la odoro estas tiom forta. Kaj la vento estas tre bela kaj malseka. Nun, rigardu min!”

Do tiun tutan matenon Jipo staris en la antaŭa parto de la ŝipo, flarante la venton kaj indikante la direkton laŭ kiu la Doktoro velu; dum ĉiuj la bestoj kaj la malgranda knabo staris apude kun siaj okuloj larĝe malfermitaj, mire rigardante la hundon.

Ĉirkaŭ la lunĉohoro Jipo petis Dab-Dabon diri al la Doktoro ke li maltrankviliĝas kaj volas paroli kun li. Do Dab-Dabo venigis la Doktoron el la alia finaĵo de la ŝipo kaj Jipo diris al li:

“La onklo de la knabo malsategas. Ni devos kiel eble plej rapidigi la ŝipon”.

“Kiel vi scias ke li malsategas?” demandis la Doktoro.

“Ĉar estas neniu alia odoro en la okcidenta vento ol flartabako”, diris Jipo. “Se la viro kuirus aŭ manĝus ion ajn, mi neeviteble flarus ankaŭ ĝin. Sed li eĉ ne havas akvon por trinki. Li nur glutas

flartabakon — grandakvante. Ni konstante pliproksimiĝas al li, ĉar la odoro fariĝas pli forta ĉiun momenton. Sed rapidigu la ŝipon kiel eble plej multe, ĉar mi certas ke la viro malsategas".

"Konsentite", diris la Doktoro; kaj li sendis Dab-Dabon peti la hirundojn tiri la ŝipon, same kiel kiam la piratoj ĉasadis ilin.

Do la bravaj birdetoj malsuprenflugis kaj denove jungis sin al la ŝipo.

Kaj nun la boato galopis tra la ondoj terure rapide. Ĝi iris tiom rapide ke la fiŝoj en la maro devis salti por liberigi la vojon, tiel ke la ŝipo ne trafos ilin.

Kaj ĉiuj la bestoj fariĝis ege ekscititaj; kaj ili ĉesis rigardi Jipon kaj turnis sin por rigardi la maron antaŭ si, por ekvidi teron aŭ insulojn kie la malsatega viro eble estas.

Sed horo post horo pasis kaj ankoraŭ la ŝipo rapidadis, sur la sama plata plata maro; kaj neniu tero videblis ie ajn.

Kaj nun la bestoj ĉesis babiladi kaj ĉirkaŭsidis silente, maltrankvile, kaj malgaje. La malgranda knabo fariĝis malfeliĉa. Kaj la vizaĝo de Jipo

aspektis malkvieta.

Fine, malfrue en la posttagmezo, ĝuste kiam la suno komencis subiri, la strigo, Tu-Tuo, kiu staris sur la pinto de la masto, subite ekscitis ilin per plejlaŭta krio:

"Jipo! Jipo! Mi vidas ege grandan rokon antaŭ ni — rigardu — tre for tie kie la ĉielo kaj la akvo renkontiĝas. Vidu la sunbrilon sur ĝi — kvazaŭ oro! Ĉu la odoro venas el tie?"

Kaj Jipo kriis al li: "Jes. Jen ĝi. Jen kie estas la viro. Fine, fine!"

Kaj kiam pli pliproksimiĝis ili povis vidi ke la roko estas tre granda — granda kiel granda kampo. Neniuj arboj kreskis sur ĝi, neniu herbo — nenio. La granda roko estis plata kaj senkovra kiel la dorso de kelonio.

Do la Doktoro veligis la ŝipon tute ĉirkaŭ la rokon. Sed nenie sur ĝi videblis homo. Ĉiuj la bestoj mallarĝigis siajn okulojn kaj rigardis kiel eble plej forte; kaj Johano Dolittle prenis teleskopon el la suba ŝipetaĝo.

Sed tute neniun vivanton ili povis vidi — eĉ ne mevon, nek asterion, nek ereton de laminario.

Ili ĉiuj staris senmove kaj aŭskultadis, streĉante siajn orelojn por trovi ian sonon. Sed la sola sono aŭdebla estis la milda plaŭdado de la malgrandaj ondoj kontraŭ la flankojn de ilia ŝipo.

Tiam ili ĉiuj komencis krii, "Halo, tie! — HALO" ĝis iliaj voĉoj raŭkiĝis. Sed nur la eĥo revenis de la roko.

Kaj la malgranda knabo ekploris kaj diris: "Mi timas ke mi neniam revidos mian onklon! Kion mi diros al oni kiam mi reestos hejme?"

Sed Jipo vokis al la Doktoro:

"Li devas esti tie — li devas — *li devas!* La odoro ne venas el pli malproksime. Li devas esti tie, mi diras! Veligu la ŝipon apud la rokon kaj mi saltos sur ĝin."

Do la Doktoro proksimigis la ŝipon plej proksimen kaj elĵetis la ankron. Tiam li kaj Jipo iris el la ŝipo sur la rokon.

Jipo tuj metis sian nazon proksime al la tero kaj komencis ĉien kuri. Tien kaj reen li iris, reen kaj tien — zigzage, tordiĝante, ripete, turnante sin. Kaj kien li iris, la Doktoro postkuris lin, proksime al liaj kalkanoj — ĝis li estis senspirega.

Fine Jipo sonigis bojegon kaj sidiĝis. Kaj kiam la Doktoro venis kure al li, li trovis la hundon gapanta en grandan profundan truon en la mezo de la roko.

“La onklo de la knabo estas en ĝi”, diris Jipo trankvile. “Ne mirinde ke tiuj stultaj agloj ne povis vidi lin. Nur hundo povas trovi homon”.

Do la Doktoro malsupreniris en la truon, kiu estis ia kavo aŭ tunelo iranta longe sub la tero. Tiam li flamigis alumeton kaj komencis sekvi senluman tunelon dum Jipo sekvis lin.

La alumeto de la Doktoro baldaŭ estingiĝis; kaj li devis flamigi plian kaj plian kaj plian.

Fine la longa tunelo finiĝis; kaj la Doktoro trovis sin en ia malgranda ĉambro kun rokaj muroj.

Kaj tie, en la mezo de la ĉambro, kun sia kapo apogata de la brakoj, kuŝis viro kun ruĝa hararo — profunde dormanta!

Jipo aliris kaj flaris ion kuŝantan sur la tero apud li. La Doktoro klinis sin kaj prenis ĝin. Ĝi estis enorma flartabakujo. Kaj ĝi estis plena de gratita nigra flartabako!

# 20. LA VILAĜO DE LA FIŜISTO



GUSTE kiam — tre tre zorge — la Doktoro vekis la viron, la alumeto estingiĝis. Kaj la viro supozis ke Ben Ali revenis, kaj li komencis pugnobati la Doktoron.

Sed kiam Johano Dolittle diris al li kiu li estas, kaj ke li havas lian malgrandan nevon sekura sur sia ŝipo, la viro estis ege feliĉa, kaj diris ke li bedaŭras esti pugnobatinta la Doktoron. Kaj li donis al la Doktoro pinĉon da flartabako.

Kaj la viro parolis pri kiel la Barbaria Drako metis lin sur ĉi tiun rokon kaj lasis lin tie, kiam li rifuzis promesi fariĝi pirato; kaj ke li dormadis en ĉi tiu truo ĉar ne estis domo sur la roko por teni lin varma.

Kaj post tio li diris:

“De kvar tagoj mi havas nenion por manĝi kaj trinki. Mi devis manĝi flartabakon”.

“Jen ja!” diris Jipo. “Ĉu mi ne diris al vi?”

Do ili flamigis kelkajn alumetojn pli kaj trovis sian vojon tra la koridoro en la taglumon; kaj la Doktoro rapidigis la viron al la boato por manĝi iom da supo.

Kiam a bestoj kaj la malgranda knabo vidis la Doktoron kaj Jipon reveni al la ŝipo kun ruĝhara viro, ili komencis hurai kaj krii kaj danci sur la boato. Kaj la hirundoj super ili komencis fajfadi kiel eble plej laŭte — milioj kaj milionoj da ili — por montri ke ankaŭ ili ĝojas ĉar la brava onklo de la knabo estis trovita. La bruo kiun ili faris estis tiom granda ke maristoj tre malproksime sur la maro pensis ke terura ŝtormo proksimiĝas. "Aŭskultu tiun tempeston muĝantan en la oriento!" ili diris.

Kaj Jipo ege fieris pri si — kvankam li multe klopodis ne aspekti orgojloplena. Kiam Dab-Dabo venis al li kaj diris, "Jipo, mi tute ne konceptis ke vi estas tiom lerta!" li nur skuetis sian kapon kaj respondis:

"Ho, estis nenio speciala. Sed hundo estas bezona por trovi homon, komprenu. Birdoj tute ne kompetentas pri tia afero".

La Doktoro demandis al la ruĝhara fiŝkaptisto kie estas lia hejmo. Kaj kiam li informis lin, la Doktoro petis la hirundojn gvidi la ŝipon tien unue.

Kaj veninte al la tero pri kiu parolis la viro, ili vidis malgrandan fiŝistan vilaĝon ĉe la piedo de rokoplena monto; kaj la viro indikis la domon kie li loĝas.

Kaj dum ili mallevis la ankron, la patrino de la malgranda knabo (ŝi estis ankaŭ la fratino de la viro) venis kurante al la bordo por renkonti ilin, ridante kaj plorante samtempe. Ŝi estis sidinta sur momento dum dudek tagoj, rigardante la maron kaj atendante ilian revenon.

Kaj ŝi kisis la Doktoron multajn fojojn, tiel ke li subridis kaj ruĝiĝis kvazaŭ lernejanino. Kaj ŝi volis kisi ankaŭ Jipon; sed li forkuris kaj kaŝis sin en la ŝipo.

„Estas stultaĵo, tiu kisado“, li diris. “Mi ne aprobas ĝin. Ŝi kisu Gub-Gubon — se ŝi *devas* iun kisi”.

La fiŝisto kaj lia fratino ne volis ke la Doktoro rapide foriru. Ili petegis lin resti kun ili kelkajn

tagojn. Do Johano Dolittle kaj liaj bestoj devis resti ĉe ilia domo tutajn sabaton kaj dimanĉon kaj duonon de lundo.

Kaj ĉiuj malgrandaj knaboj de la fiŝista vilaĝo malsupreniris al la plaĝo kaj indikis la grandan ŝipon ankritan tie, kaj flustris unu al la alia:

“Vidu! Tio estis ŝipo de pirato — de Ben Ali —



“Kaj ŝi kisis la Doktoron multajn fojojn.”

la plej terura pirato kiu iam velis sur la Sep Maroj! La maljunulo kun la alta ĉapelo, kiu loĝas ĉe S-ino Treveljano, *li* forprenis la ŝipon de la Barbaria Drako — kaj devigis lin esti kultivisto. Kiu povus supozi tion pri li — li kiu aspektas tiom milda kaj afabla! … Rigardu la grandajn ruĝajn velojn! Vere fiist-aspekta ŝipo — kaj rapidega! — Ho!”

Dum tiuj du kaj duona tagoj kiam la Doktoro restis ĉe la malgranda fiŝista vilaĝo la homoj ripete invitis lin al tetrinkado kaj manĝoj kaj lunĉoj kaj festenoj; la virinoj ĉiuj sendis al li skatolojn da floroj kaj dolĉaĵoj; kaj la vilaĝa bando ludis muzikon sub lia fenestro ĉiunokte.

Fine la Doktoro diris:

"Bonaj homoj, nun mi devas reiri hejmon. Vi vere estis tre afablaj. Mi ĉiam memoros vin. Sed mi devas hejmon iri — ĉar mi havas laboron farendan".

Tiam, ĝuste kiam la Doktoro estis forironta, la Vilaĝestro venis laŭ la strato kaj multaj aliaj personoj en elegantaj vestoj akompanis lin. Kaj la Vilaĝestro haltis antaŭ la domo kie loĝas la Doktoro; kaj ĉiuj vilaĝanoj grupiĝis por vidi kio okazos.

Ses paĝiknaboj blovis brilantajn trumpetojn por ke la homoj ĉesu paroli, kaj post tio la Doktoro venis al la ŝtupoj kaj la Vilaĝestro parolis:

"Doktoro Johano Dolittle", diris li; "estas granda plezuro por mi prezenti al la viro kiu mankigis al la maroj la Drakon de Barbario ĉi tiun

malgrandan donacon de la dankema popolo de nia meritoplena Vilaĝo".

Kaj la Vilaĝestro prenis el sia poŝo malgrandan pakaĵon kovritan per silkopapero, kaj malferminte ĝin, li transdonis al la Doktoro vere belegan poŝhorloĝon kun aŭtentikaj diamantoj en la malantaŭo.

Post tio la Vilaĝestro prenis el sia poŝo eĉ pli grandan pakaĵon kaj diris:

"Kie estas la hundo?"

Tiam ĉiuj komencis serĉi Jipon. Kaj fine Dab-Dabo trovis lin aliflanke de la vilaĝo en stalkorto kie ĉiuj hundoj de la regiono staris ĉirkaŭ lin silentaj pro admirado kaj respekto.

Kiam Jipo estis venigita al la flanko de la Doktoro, la Vilaĝestro malfermis la pli grandan pakaĵon; kaj en ĝi estis hundokolumo el solida oro! Kaj granda miroplena murmuro sonis el la vilaĝanoj dum la Vilaĝestro klinis sin kaj ligis ĝin ĉirkaŭ la kolon de la hundo per siaj propraj manoj.

Ĉar skribitaj sur la kolumo per grandaj literoj estis ĉi tiuj vortoj: "JIPO — *la Plej Lerta Hundo en la Mondo*".

Post tio la tuta homamaso movis sin al la plaĝo por adiaŭi ilin. Kaj post kiam la ruĝhara fiŝisto kaj lia fratino kaj la malgranda knabo dankis la Doktoron kaj lian hundon multafoje, la granda rapida ŝipo kun la ruĝaj veloj estis denove turnita cele Puddlebyn kaj ili ekvelis sur la maro, dum la vilaĝa bando ludis muzikon sur la bordo.

# 21. DENOVE HEJME

MARTAJ ventoj jam venis kaj foriris; aprilaj pluvoj jam finiĝis; majaj burĝonoj estis fariĝintaj floroj; kaj la junia suno brilis sur la agrablajn kampojn kiam Johano Dolittle fine revenis al sia propra lando.

Sed li ankoraŭ ne reiris al Puddleby. Unue, li komencis veturadi tra la lando kun la puŝumi-tiruvio en cigançaro, haltante ĉe ĉiu regiona foiro. Kaj tie, kun la akrobatoj unuflanke kaj la pulĉinela prezento aliflanke, ili pendigis grandan afiŝon kies teksto diris, "VENU VIDI LA MIRINDAN DUKAPAN BESTON EL LA ĜANGALOJ DE AFRIKO. Eniro kostas SES PENCOJN".

Kaj la puŝumi-tiruvio restis en la ĉaro dum la aliaj bestoj kuŝadis sub ĝi. La Doktoro sidis en seĝo antaŭ la ĉaro prenante sespencojn kaj ridetante al la enirantoj; kaj Dab-Dabo estis konstante okupata per sia riproĉado al li ĉar li

permesis infanojn eniri senpage kiam ŝi ne rigardis lin.


Kaj menaĝeriestroj kaj cirkestroj venis kaj petis la Doktoron vendi la kuriozan beston al ili, dirante ke ili pagos grandegan kvanton da mono por li. Sed la Doktoro ĉiam kapneis kaj diris:

“Ne. La puŝumi-tiruvio neniam estos enfermita en kaĝo. Li ĉiam rajtos libere veni kaj iri, same kiel vi kaj mi”.

Multaj kuriozajn vidaĵojn kaj eventojn ili vidis dum tiu vagadoplena vivo; sed ĉio ŝajnis tre ordinara post la grandaĵoj kiuj ili estis vidintaj kaj farintaj en fremdaj landoj. Estis tre interese, unue, esti parto de cirko; sed post kelkaj semajnoj ili ĉiuj ege enuis pro ĝi, kaj la Doktoro kaj ili ĉiuj sopiregis reiri hejmen.

Sed tiom da personoj venadis al la malgranda ĉaro kaj pagis sespencojn por eniri kaj vidi la puŝumi-tiruvion ke tre baldaŭ la Doktoro povis rezigni esti prezentisto.

Kaj unu belan tagon, kiam la rozalteoj belegis, li revenis al Puddleby estante riĉulo, por loĝi en la malgranda domo kun la granda ĝardeno.





"La Doktoro sidis en seĝo antaŭ la ĉaro."

Kaj la maljuna lama ĉevalo en la stalo ĝojis vidi lin; ankaŭ la hirundoj kiuj jam estis konstruintaj siajn nestojn sub la aleroj de lia tegmento kaj elovigis bebojn. Kaj ankaŭ Dab-Dabo ĝojis reesti en la domo kiom ŝi tiom bone konis — kvankam necesis fari ege multaj senpolvigadon, kun araneretoj ĉie.

Kaj irinte montri sian oran kolumon al la aroganta ŝafhundo najbara, Jipo revenis kaj komencis ĉirkaŭkuradi en la ĝardeno kvazaŭ freneze, serĉante la ostojn kiujn li estis enterigita antaŭ longe, kaj ĉasante la ratojn el la uzil-dometo; dum Gub-Gubo elfosis la krenon kiu estis altiĝinta tri metrojn en la angulo apud la muro de la ĝardeno.

Kaj la Doktoro vizitis la mariston kiu estis pruntedoninta al li la boaton, kaj li aĉetis du novajn ŝipojn por li kaj kaŭĉukan pupon por lia bebo; kaj li pagis la manĝaĵvendiston pro la manĝaĵoj kiujn li estis pruntedoninta al li por la vojaĝo al Afriko. Kaj li aĉetis novan pianon kaj metis la blankajn musojn en ĝin — ĉar ili diris ke la tirkeston trablovis la venteto.



"Li komencis kuri ĉirkaŭ la ĝardeno kvazaŭ freneza."

Eĉ kiam la Doktoro estis pleniginta la malnovan monkeston sur la breto de la vestoŝranko, restis al li ankoraŭ multa mono; kaj li devis aĉeti tri monkestojn pli, egale grandajn, por meti la monon en ilin. "Mono", li diris, "estas aĉa ĝenaĵo. Sed estas feliĉige, ne bezoni senti ĝian mankon".

"Jes", diris Dab-Dabo, kiu toastis platpanon por lia posttagmeza manĝo, "Jes ja!"

Kaj kiam la vintro revenis, kaj la neĝo flugis kontraŭ la fenestron de la kuirejo, la Doktoro kaj liaj bestoj sidis ĉirkaŭ la granda varma fajro post la vespermanĝo; kaj li voĉlegis al ili el siaj libroj.

Sed tre malproksime en Afriko, kie la simioj babiladis en la palmarboj antaŭ ol enlitiĝi sub la granda flava luno, ili diris unu inter la alia:

"Estus bone scii kion la Bona Viro faras nun — tie, en la Lando de la Blankuloj! Ĉu vi kredas ke iam li revenos?

Kaj Polinezio sonigis el sub la grimpoplantoj: "Mi kredas ke jes — mi supozas ke jes — mi esperas ke jes!"

Kaj la krokodilo muĝis al ili el la nigra koto de

la rivero:

"Mi CERTAS ke jes — endormiĝu!"



# KELKAJ NOTOJ

p.1: La nomo DOLITTLE prononciĝas, proksimume, dúlitl (oni akcentas la unuan silabon).

p.1: La nomo PUDDLEBY prononciĝas, proksimume: pádlbi.

p.7: "Jadi" eŭfemismo por "Je Dio", reprezentanta diversajn tiajn eŭfemismojn en la originalo.

p.79: "Ĉu leopardo…" Citaĵo el la Biblio (*Jeremia 13.23*), kvankam Doktoro Dolittle inversigas la ordon (en la biblia teksto: "Ĉu la negro povas ŝanĝi sian haŭton, aŭ leopardo siajn makulojn).

p. 91: *Barbario*. La norda bordo de Afriko, kiu de la 17-19aj jarcentoj estis fama pro siaj piratoj, kiuj ĉasis, kaptis, kaj detruis ŝipojn irantajn en la Mediteraneo.